

1986 oktobro
79a jaro
n-ro 970 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Unesko kvardekjara
Esperanto kaj la monda paco

Vi trovos,

krom ĉefartikolon honore al la kvardekjariĝo de Unesko, ankaŭ tre ampleksan analizon de Ulrich Lins pri la rolo de Esperanto kaj UEA rilate la mondan pacon. Pri tiuj temoj vidu la prikovrilan tekston sube. Cetere menciindas la nekutime granda titolkvanto sub *Laste aperis...*, kiun tamen superas la nombro da libroj ankoraŭ ĝis la jarfino prinotendaj! Tio en si mem estas esperodona signo pri la sanstato de nia lingvo sojle de ĝia centjariĝo. Ĉu oni nun rajtas atendi similan viklecon rilate aĉetadon?

Atentemaj legantoj rimarkos, ke denove ŝanĝiĝis la redakta teamo. Lastatempe eklaboris en ĝi Mark Fettes, nova juna oficisto kiu antaŭe loĝis diverse en Usono, Nov-Zelando, Britio kaj Kanado.

Enhavo

- 161 Unuiĝintaj Nacioj: Unesko — 40 jaroj da agado (Amadou Mahtar M' Bow)
- 162 Kvin novaj honoraj membroj de UEA
- 163 42a IJK: Ferietosa TEJO-kongreso (Martin Haase/Thomas Pusch)
- 165 Internacia Jaro de Paco: La kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la monda paco (Ulrich Lins)
- 171 Kongresoj: SAT festos la Jubileon en Bulonjo-sur-Marco
Faka agado: ILEI antaŭ nova epoko? (E. Symoens); Afrikaj studentinoj diplomiĝos ĉe AIS
- 172 Reagoj: Epizodoj el la longa vivo de UEA-delegito (Oswald Haselbauer); Pri unueco kaj logiko (Rob Vetter; Heinz Platter)
- 173 Novaj projektoj de Eduka Fondaĵo "Carson" (A. Whittaker)
- 174 Nekrologo: Dorothy Henderson (V. Sindona Eichholz)
Recenzoj: *Naturo kaj socio* de Edgar Guhde/trad. W. Gunther k.a (W.J. Nijveld); *Pordoj* de Stefan MacGill (Martin Haase)
- 175 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo);
Aŭkcio de historiaĵoj
- 178 Nekrologoj; Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 179 Kotiztabelo por 1987
- 180 Anoncetoj; Oficiala Informilo

La kovrilo

simbolas reciprokan kompreniĝon kaj proksimiĝon inter la popoloj de la mondo: revon, kiun postĉasas la homaro jam dum jarmiloj. Ankaŭ por ni, esperantistoj, briletadis tiu celo ekde la komenco de nia lingvo kaj movado. Ĝuste tion reliefigas la elstara artikolo de Ulrich Lins en tiu ĉi numero. Neniu, jam traleginta tiun artikolon, povus pridubi la kontribuon de la Esperanto-movado al la ĝenerala strebado al la monda paco, nek la necese intiman ligon inter la du aferoj. Tamen decas esti humila. Validas ankaŭ por ni la vortoj de Albert Schweitzer, Nobel-premiito pri paco en 1952, okaze de la aljuĝo: "Ne eblas fari sufiĉe por la paco." Tial estas urĝe dezirinde, ke ĉiuj ni, kiuj uzas kaj prizorgas Esperanton, konscie pluceladu la plifortigon kaj kreskigon de homa solidareco.

Tion celas ankaŭ Unesko, organizo kun kiu UEA kunlaboris jam dum 32 jaroj. La ĉi-numera ĉefartikolo spegulas diversajn aspektojn de la uneska laboro, perfekte harmoniajn kun la celoj de Esperanto; kaj substrekas la gravecon de nia daŭra subtenado.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 UEA NL; **Telegram-adreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.** Voĉlegata por blinduloj.

Redaktas: O. Buller kaj M. Fettes.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44,50; US \$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150.

Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%.

Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744.

Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; tel. (1) 42 37 14 73.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung. tel. (1) 316-423.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cicina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio. (583) 570 66.

Estrarano (gvidas la fakon pri financo): d-ro Victor Sadler, Livingstonelaan 304, NL-3526 HW Utrecht, Nederlando; tel. (30) 88 68 37.

Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Unesko: 40 jaroj da agado

La Organizo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo, Unesko, ekpaŝis sur la mondan scenejon la 4an de novembro, 1946. Dum la lastaj kvardek jaroj, ĝi faris netakseblajn kontribuojn al la progresigo de interpopola kompreniĝo kaj amikeco. Esperanton ĝi prave agnoskis, unue en 1954 kaj lastatempe en 1985, kiel gravan ilon en la serĉo por monda paco.

La suba teksto estas mallongigita versio de parolado, kiun faris la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, okaze de datrevena ceremonio en Parizo. Per ĝia aperigo, ni celas daŭrigi la kunlaboron de UEA pri disvastigado de priuneskaj informoj kaj subtenado de ties laboro.

Antaŭ 40 jaroj, nur kelkajn semajnojn post la fino de la Dua Mondmilito, kunvenis en Londono la Konferenco de Aliancanaj Edukministroj por akcepti la Konstitucion de Unesko.

Al la terura kosto de ses jaroj da detruado kaj morto, kiujn la mondo ĵus travivis, nun aldoniĝis la minaco aŭgurita per la eksplodo de du atombomboj ĉe Hiroŝima kaj Nagasaki. Super la ruinoj de la neniiĝitaj urboj, ene de la ĉiea doloro, frontante perspektivon pri novaj formoj de amasmortigo, la komunumo internacia konsciiĝis pri tiuj komunaj devoj, kiujn ĝi devus alpreni por certigi la estontecon de nia specio.

Kadre de la nove starigita sistemo de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko ricevis la taskon progresigi internacian pacon kaj la komunan bonfarton de la homaro, pere de "la edukaj, sciencaj kaj kulturaj rilatoj de la popoloj de la mondo" — alivorte, internacia intelekta kunlaboro.

Celante realigi "iun staton, en kiu la instigojn al milito nuligos sociaj, spiritaj kaj ekonomiaj pliboniĝoj...", Unesko implikiĝis en vigla agado en multaj diversaj kampoj — la disvolvo de grandiozaj, normigaj konceptoj; la diskonigo de scioj, ideoj kaj informoj; kaj praktikaj agoj por helpi al la plej malriĉaj landoj. Ĉi tiu agado celis i.a. kultivi reciprokan konon kaj komprenon inter la nacioj; plifaciligi per taŭgaj metodoj de kunlaboro la utiligon fare de ĉiuj popoloj de tio, kion ĉiu estis produktinta kaj produktanta en ĉiuj kampoj de pensado, arta kreado, kaj scienca kaj teknika malkovro kaj esplorado; realigi kondiĉojn, en kiuj ĉiu havus egalan ŝancon edukigi; kaj ebligi liberan interŝanĝon de ideoj kaj informoj.

Dum la jaroj, Unesko senĉese plilarĝigis la bazon de sia reprezenteco. Ĝia agado je tiu ĉi flanko konstante kreskis laŭ amplekso kaj komplikeco — aparte pro la aliĝo, dum la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj, de preskaŭ cent landoj kiuj tiutempe akiris la rajton de memregado.

Tiuj ĉi landoj kunportis siajn historiajn kaj kulturajn spertojn en la Organizon; ili esprimis siajn apartajn interesojn; ili elvokis siajn proprajn zorgojn. Aparte temas pri la evoluantaj landoj, kiuj starigis demandojn rilatajn al la malfacilaj, foje eĉ timigaj, cirkonstancoj kiujn ili alfrontis, al la multflankaj defioj kiuj baris la vojon, kaj al la diversaj rimedoj kiujn ili priesploris por certigi evoluon aŭtentikan.

Tiel Unesko komencis pripensi la realon de pli kaj pli interdependa mondo, en kiu socioj interkontaktiĝas laŭ pli aŭ malpli alta grado, kaj konsistigas partojn de tutmonda sistemo de reciprokaj interŝanĝoj kaj rilatoj.

Pro tiu disvolviĝo, Unesko, kiu unue koncentris siajn agojn al difinitaj mondopartoj, iom post iom estis instigita etendi ilin mondkalen.

Dum la lastaj kvardek jaroj, Unesko tiel ebligis disvolvon de tuta aro da komunikaj, interŝanĝaj, kunlaboraj kaj kunagaj retoj, etendiĝantaj en la plej diversajn kampojn, gvidantaj al kolosa progreso en scioj kaj lertoj, kaj instigantaj la popolojn kaj la kulturojn de la mondo alproksimiĝi unuj al la aliaj.



Tra la tuto de tiuj jardekoj, Unesko strebis por ĉerpi el tri fontoj de energio — la politika realo de la registaroj de Ŝtatoj-Membroj; la krea impulso de spiritaj, intelektaj kaj artaj komunumoj; kaj la kompetento kaj sindono de internacia Sekretariato

kiun oni alvokas por subteni kaj kunordigi la ideojn, iniciatojn kaj projektojn de ĉiuj.

Mi ne povas fini sen aldoni, ke la mondo hodiaŭ renkontas nombron da gravaj malfacilaĵoj, kiuj speguliĝas en la funkciado de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj, kaj sekve en Unesko.

Tiuj malfacilaĵoj sendube prezentas okazon denovan por ekzameni kelkajn el la funkcioj de la sistemo, cele al ilia demokratiigo; tamen, ili jam kaŭzis tion, ke iuj homoj pridubis la motivojn kaj celojn de la sistemo, kaj eĉ la bazajn kialojn por ĝia ekzisto.

Tiu ĉi ne estas la unua fojo, kiam Unuiĝintaj Nacioj frontis defiojn tiajn. Tial estas grave, ke la estroj de la diversaj instancoj de la sistemo akceptu siajn respondecojn en plena mezuro.

Ne plu temas pri tio, ke ili simple progresigu laŭeble la nuntempajn aferojn. Laŭ sia konsciencgvido, observe al la principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la Konstitucioj de siaj respektivaj organizoj, ili ankaŭ — kaj tio eble eĉ pli gravas — devas leviĝi super dependajn kaj flankajn aferojn por gardi sekurajn ĉiujn ŝancojn por la estonteco.

En tiu ĉi jaro, kiu markas la kvardekan datrevenon de Unesko, estas kun tiu konvinkiĝo, ke mi denove alvokas ĉiujn intelektulojn tra la mondo por plifortikigi, per nia Organizo, la ligilojn de solidareco bazita sur la fortoj de libereco, kreemo kaj progreso — ĝuste tiuj fortoj de la spirito, por kies kuniĝo Unesko ekzistas.


Amadou Mahtar M' Bow

HONORAJ MEMBROJ

Kvin novaj honoraj membroj de UEA

Laŭ propono de la Estraro, la Komitato de UEA elektis dum la 71a UK en Pekino kvin novajn Honorajn Membrojn de la Asocio. Ĉi-sekve vi trovas skizajn biografietojn de tiuj kvin internacie elstaraj geaktivuloj.

Tibor Sekelj (1912), jugoslavo, esperantistiĝis en 1929, juristo kaj magistro pri muzeologio. El liaj multaj vojaĝoj tra la mondo rezultis plurdeko da libroj. Li pioniris por la Internacia Lingvo, fondante dekojn da Esperanto-societoj kaj ok landajn asociojn. En pluraj Unesko-konferencoj li reprezentis UEA, i.a. en Sofio 1985, kie li grave kontribuis al la akcepto de la rezolucio pri la centjariĝo de Esperanto (vd. *Esperanto*, decembro 1985). Mag. Sekelj, kiu en 1986 elektiĝis membro de la Akademio de Esperanto, estas prezidanto de Esperantlingva Verkista Asocio. Inter liaj verkoj elstaras: *Tempesto super*




Kvin elstaraj esperantistoj, naskiĝintaj dise tra la terglobo dum la periodo 1911-1913, en la 71a UK prenis siajn vicojn inter la Honoraj Membroj de UEA. De maldekstre: Yukiko Isobe (Japanio), Ye Laishi (Ĉinio), Catherine L. Schulze (Usono), Zhang Quicheng (Ĉinio) kaj Tibor Sekelj (Jugoslavio).

Akonkagvo (traduko, 1959); *Nepalo malfermas la pordon* (1959); *Tra lando de indianoj* (rakontaro, 1970); *Premiitaj kaj aliaj noveloj* (1974); *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* (romaneto, 1979, tradukita el Esperanto en dek ses lingvojn); *Mondo de travivaĵoj* (rakontaro, 1981); *Elpafu la sagon* (antologio de buŝa poezio, 1983).

Ye Laishi (Ĵelezo) (1911), ĉino, esperantistiĝis en 1927. En 1932 li aliĝis al Ĉina Proleta Esperantista Unio kaj agis kiel ties estrarano. En la jaro 1933 li iniciatis la fondon de Ŝanhaja Esperantista Ligo. Li redaktis dum pluraj jaroj la gravajn gazetojn *La mondo* (1932-1936), *Ĉinio hurlas* kaj *Heroldo de Ĉinio* kaj kunfondis Korespondan Esperanto-Lernejon en Chongqing (1940). Li multe kontribuis al divastigo de Esperanto en Ĉinio en la 30aj kaj 40aj jaroj. Li aŭtoris multajn artikolojn kaj lernilojn pri Esperanto. Ĵelezo fariĝis vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo ekde ties fondiĝo kaj nun estas ĝia aganta prezidanto. Post 1949 li rolis kiel vicdirektoro de la Lingva Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, vicministro de la Ŝtata Komisiono pri Reformado de la Ĉina Skriba Lingvo kaj nun estas konsilisto de la Ŝtata Komisiono de Lingvo (rango de vicministro).

Zhang Qicheng (1913), ĉino, eklernis Esperanton en 1928. En 1933 li kunfondis Ŝanhajan Esperantistan Ligon. Dum pluraj jaroj antaŭ la milito li redaktis la informan bultenon *Ĉinio Hurlas* kaj kunredaktis la influan Esperantan revuon *La Mondo*. Post la ekesto de Ĉina Popola Respubliko li kunfondis ankaŭ Ĉinan Esperanto-Ligon kaj la renoman



Esperantan revuon *El Popola Ĉinio*. En la ĉina Esperanto-movado li havis gravajn postenojn kaj ankaŭ nun estas ĝenerala sekretario de ĈEL. Post la aliĝo de ĈEL al UEA (1980) li fariĝis kaj pluestas komitatano de UEA. Kiel profesia ĵurnalisto kaj redaktoro de pluraj ĵurnaloj kaj revuoj en Wuhan, Chonqing, Singapuro kaj Honkongo, li aŭtoris, por nacilingvaj kaj Esperantaj revuoj, diversajn artikolojn pri Esperanto kaj pri la problemoj de internacia lingvo.

Yukiko Isobe (1913), japanino, eklernis Esperanton en 1933. En 1934 ŝi diplomiĝis pri la anglaj lingvo kaj literaturo en Tokio; tri jarojn poste ŝi studis sociologion en Kalifornio. Ŝi fondis propran firmaron en 1971, ĉe kiu ŝi ankoraŭ laboras kiel direktorino. Jam en 1939 s-ino Isobe fariĝis konsiliano de Japano Esperanto-Instituto. Ŝi membris en la LKK de la 50a Universala Kongreso en Tokio (1965), pro kiu ŝi dum ses monatoj en 1964 prelegvojaĝis pri Japanio tra Eŭropo. De 1971 ĝis 1978 ŝi estis administra direktoro de JEI, kaj en 1979 elektiĝis ĉefdirektoro. Ĉirkaŭ jam 20 jarojn ŝi prezidas Esperantistan Virinan Asocion (EVA) kaj ŝi tre helpis la fondiĝon de Esperantista Go-Ligo Internacia. De 1974 ŝi aktivas kiel komitatano de UEA. En 1985, kiam oni establis la Japanan komisionon por la Centjara Jubileo de Esperanto, ŝi elektiĝis prezidanto de tiu komisiono. Dum sia longa esperantista vivo ŝi verkis multajn artikolojn pri kaj en Esperanto.

Catherine L. Schulze (1913), usonanino, esperantistiĝis en 1946. Ŝi instruis Esperanton private, en publikaj lernejoj kaj popolaj kolegioj de Kalifornio,

i.a. en San-Francisko. En la pasintaj tri jaroj ŝi instruis Esperanton al 1 973 lernantoj per senpaga koresponda kurso. Ŝi estas sekretario de San-Franciska Esperanto-Regiona Organizo, estis estrarano kaj poste vicprezidanto de ELNA 1972-1975; nun ŝi agas ankaŭ kiel redaktoro de la *ELNA Newsletter* (ELNA-novaĵletero). Kune kun sia edzo, W.H. Schulze, ŝi direktis de 1964 la Esperanto-Inform-Centron kaj Esperanto-Libro-Servon por Usono, ĝis 1974, kiam ili transdonis ĝin al ELNA ĉe la malfermo de ties centra oficejo. S-ino Schulze iniciatis ĉe la San-Franciska Ŝtata Universitato la someran Esperanto-programon, kiu nun, en sia 17a jaro, ampleksas kvar nivelojn, kaj por kiu la Universitato dungas unuarangajn profesorojn. Tiuj kursoj sub ŝia gvido elkreskis en unu el la plej seriozaj universitatnivelaĵoj de Esperanto.

42a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Ferietosa TEJO-kongreso

En granda rondo sur apudnaĝeja herbejo sidas aro da gejunuloj, ripozantaj en komfortaj kuŝseĝoj kaj vestitaj per sunvestoj. En tiu ĉi rondo, oni tamen diskutas gravajn demandojn: temas pri la Komitato de TEJO, kiu kunsidas kadre de la 42a Internacia Junulara Kongreso en Neurim (Israelo), en perfekte feria ĉirkaŭaĵo; tamen ĝi estas ne decidpova, ĉar nur malpli ol duono de la komitatanoj ĉeestas. La plej gravaj temoj de la komitataj diskutoj estas la sorto de Pasporta Servo, la demando kie okazigi la IJK-on en 1988, kaj la aliĝpeto de Usona Esperanto-Junularo (USEJ). La reviviĝo de junulara agado en Usono ŝuldiĝas grandparte al la jam tradiciigantaj grupinterŝanĝoj de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj ĝis nun neorganizitaj unuopuloj en Usono. La baldaŭa akcepto de tiu landa sekcio en TEJO — same kiel ĉiuj aliaj gravaj decidoj — devas ankoraŭ atendi skriban ratifon de la tuta Komitato.

La sceno ĉe la naĝbaseno bildigas la nekutiman karakteron de tiu ekstereŭropa kongreso: nur 105 partoprenantoj, ĉefe el Israelo kaj okcidenta Eŭropo, profitantaj de mediteranea klimato. La vetero tamen ne malvigligis la kongresan programon. Ĝi estis eksterordinare plena je prelegoj kaj diskut-rondoj, kiuj traktis la kongresan temon: "Reviviĝo de lingvoj kaj etnaj kulturoj". Tiu temo forte ligiĝas al la kongreslando. Kiel lando de enmigrintoj, Israelo fariĝis mikspoto de tre malsamaj kulturoj, vivkulturoj, moroj; la malnova mortinta hebrea lingvo reviviĝis kiel helplingvo inter la malsamlingvaj enmigrintoj kaj kiel kulturlingvo de la juna ŝtato. Verŝajne ankaŭ pro tio, la lingvokurso pri la hebrea estis

multnombre partoprenata. Simile sukcesa estis la lingvokurso pri la (palestin-)araba, laŭ kelkaj la plej partopreninda laborgrupo de la kongreso.

Tiuj, kiuj ne volis kontentiĝi per la du lingvoj de Palestino, havis la eblecon lerni iom pri la ĉina skribo, en prelego de la TEJO-prezidanto Ian Jackson (Honkongo). Sed oni ne nur traktis la lingvan aspekton de la temo; traktiĝis ankaŭ diversaj kulturaj aspektoj, ekz. religio, humuro kaj aliaj. La mikseco



de la israela kulturo bone esprimiĝis i.a. en la laborgrupo pri israelaj popoldancoj, kiun gvidis Robert Haddon. En pluraj teoriaj kontribuoj, prelegantoj al malsamaj mondpartoj pledis por aŭ kontraŭ revivigo de lingvoj kaj kulturoj, ĉiam instigante al viglaj diskutoj.

Inter la vesperaj programeroj elstaris — laŭ la opinio de multaj kongresanoj — la israela vespero kaj la teatra vespero, kiun refoje sukcesigis la germana trupo "Kia koincido", ĉi-foje per la kontraŭmilita teatraĵo *Pikniko en la kampo* de F. Arrabal. Same sukcesa estis la internacia vespero, kvankam — kiel kutime — ĝi daŭris sufiĉe longe. Plej elstara tie estis la kontribuo de la koreino Ĉe Junhi, kiu ebligis enrigardi la korean kulturon; sed ankaŭ denova kontribuo de "Kia koincido", kaj la kantado de la plej multnombra delegacio (la germana), ricevis tondran aplaŭdon. Bedaŭrinde, la salono, kie okazis tiu kaj kelkaj aliaj vesperaj programoj, pruviĝis sufiĉe maltaŭga, ĉefe el akustika vidpunkto.


La kongresa programo inkluzivis tuttagan ekskurson al Jerusalemo, la "eterna" urbo, kiu tiel ofte destruiĝis kaj reviviĝis. Sankta al multaj religioj, inter kiuj la plej gravaj unudiaj de la mondo, ĝi estas la umbiliko de tiom da kulturoj, ke oni senĉese renkontas ion novan, pasante tra la diversaj kvartaloj. La ekskursantoj vizitis la muzeon de la holokaŭsto, la parlamentejon kaj la malnovan urbon. Tagmeze, oni piknikis en la Arbaro de la Paco, kie ni plantis "Esperanto-arbaron": ĉiu partoprenanto plantis arbon, kiu restos kaj kreskos, simbole al la grava kontribuo de Esperanto al la tutmonda paco.

Krom la tuttaga ekskurso, la kongresanaro estis invitita ankoraŭ al du duontagaj. La unua kondukis nin al kibuco, tia kooperativa vilaĝo, kia ludis gravan rolon dum la israeligo de tiu ĉi mondoparto, kaj ankoraŭ nun ĉefrolas en la agrokulturo de tiu lando. La dua kondukis nin al araba vilaĝo. Tie nin gastigis la loka skabeno, kiu regalis nin laŭ la kutimoj de araba gastamo.

Dum la malmulta "libertempo", kiun lasis al ni la kongresa programo, eblis abunde sunbruniĝi, naĝi en baseno aŭ en Mediteranea Maro, kiu troviĝis tuj apud nia kongresejo, cetere lerneja vilaĝeto tute taŭga por tiaj aranĝoj. La anoj de la internacia ĥoro sub la gvido de Kostas Zaĥarakis (Greklando) kompreneble ne povis plene profiti de la programpaŭzoj, ĉar tiam necesis provkanti. La rezulton de iliaj klopodoj ĉiuj povis sperti dum la adiaŭa vespero. Bedaŭrinde, la ĥoro ne povis esti tiel multnombra kiel lastjare (por ne paroli pri la venonta jaro ...), sed ĝia sukceso estis impona.

Post la fino de la kongreso, multaj restis ankoraŭ por konatiĝi kun tiu lando, interalie per riĉaj sed tre streĉaj postkongresaj aranĝoj. Eblis ekskursi al la sudo de Israelo, nome al la Morta Maro kaj la dezerto, kaj al Egiptio. Kvankam streĉaj, ambaŭ aranĝoj estis tre aventur- kaj spertoplenaj. Krome, eblis kompreneble pli intense esplori Jerusalemon aŭ profiti de la gastiga servo de israelaj esperantistoj, por individue vizitadi la landon.

Fotoj: A. Wandel



Ludo dum la interkonatiĝa vespero: vasta subteno por TEJO-Prezidanto Ian Jackson.

La 42a IJK certe estis sukcesa kongreso. Ĝi ludis gravan rolon en la plifortigo kaj junigo de la israela Esperanto-movado. Ĝi ankaŭ konatigis nin kun la interesa kaj ofte kontraŭdira kulturaro de la invitinta lando, pri kies politika rolo kompreneble ne mankis diskutoj. La malmultnombra partoprenantaro kaj sekve familia etoso estis agrabla kontrasto al niaj kutimaj amaskongresoj, sed ĝi ankaŭ memorigas pri la baroj, kiuj obstine disdividas la mondon.

Martin Haase kaj Thomas Pusch

La kontribuo de Universala Esperanto-Asocio al la monda paco

1. La sinteno de la Esperanto-movado al la problemoj de paco kaj interpopola kompreniĝo

La celoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas, laŭ ĝia Statuto:

(a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;

(b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;

(c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;

(ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

La agadoj kaj atingoj konformaj kun la unua celo — en pli malvasta senco, la varbado por Esperanto — restas en la ĉi-sekva superrigardo grandparte ekster konsidero. Anstataŭe, ni limigas nin al specifa aspekto de la agado de UEA, kiu akordas kun la dua celo, nome al la kontribuo de la Esperanto-movado por la akcelo de la monda paco kaj por la interproksimigo de la popoloj. Per tio ni deziras montri, ke, unue, Esperanto — kvankam ankoraŭ ne oficiale akceptita kiel dua lingvo de ĉiu homo por uzo en internacia komunikado — jam delonge estas lingvo plene funkcipova kaj kapabla je praktikaj atingoj, ĝuste ankaŭ sur kampo aparte grava en la nuna monda situacio, kaj ke, due, la laboro por disvastigo de Esperanto, kiun nun ĉefe gvidas UEA, per si mem estas nedisigeble ligita kun la strebo al paco kaj internacia kunlaboro.

La ideo de interŝtata paco kaj de interhoma solidareco akompanas Esperanton ekde ĝia naskiĝo. Kiam la juda okulkuracisto Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917) publikigis en Varsovio en 1887 la unuan lernolibron de sia "lingvo internacia", li vidis en tio provon realigi revon de sia junaĝo. En Bialystok, la naskiĝurbo de Zamenhof, kunvivis judoj, poloj, rusoj, kaj germanoj, kies reciproka malamikkeco forte turmentis la infanan animon. Zamenhof poste memoris: "En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diversseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa, kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj." Pro tio, skribis Zamenhof, li decidiĝis, ke "kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon".

Al la konvinko, ke Esperanto povus servi al la forigo de la malbono de diverslingveco kaj tiel kontribui al interfratiĝo de la homaro, ŝuldiĝis la rapida kaj granda resonado, kiun la lingvo trovis unue inter rusoj, poste inter germanoj kaj francoj kaj iom post iom ankaŭ en aliaj mondpartoj. La idealisma impulso de Zamenhof helpis, aldone al la lingva esprimovo de Esperanto, levi la lingvon en surprize mallonga tempo al pozicio, kiun aliaj projektoj de artefarita lingvo ne atingis, nome al la rango de vivanta lingvo.

La emocia potenco, kiun entenis la kredo pri polinterfratiga misio de Esperanto, kaŭzis, ke reflektado pri la utopiaj elementoj en la pensado de Zamenhof komence ne okazis. Ĝi estis subordigita konsidere al la fakto, ke Esperanto tuj kontentigis la bezonon de kreskanta kolektivo je komunikado kaj ke ĝi — kiom ajn malproksima ŝajnis la celo de frata homaro — dekomence montriĝis utila ankaŭ por




Ludwig L. Zamenhof (1859-1917), iniciatinto de Esperanto: "...ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj."

praktikaj celoj. En epoko, kiam la sento pri internacia solidareco estis ankoraŭ subevoluinta, kiam regis la konkuro de imperiismaj potencoj kaj kiam estis faritaj nur modestaj provoj ellabori regulojn por arbitracia solvado de interŝtataj konfliktoj, tute ne estis mirige, ke la adeptoj de Esperanto emis iom trotaksi la interpacigan rolon de sia lingvo, vidante esprimita en ĝi la sopiron de la homaro al unueco.

Tamen, malgraŭ la — de ekstere rigardate — troa priatento de la *lingvaj* radikoj de internacia malpaco, ne forestis kompreno pri tio, ke por ebligi pacan kunvivadon de la homoj necesas fari pli, ol venki la lingvan diversecon. Zamenhof mem konsciis, ke neŭtrala, supernacia lingvo ne sufiĉas por interproksimigi la popolojn. En sia junaĝo li aktivis en la cionisma movado, sed poste li decidis alpaŝi solvon de la problemo de rasa diskriminacio (kiu instigis lin al tiu aktivado) en pli larĝa skalo. Grandan parton de sia energio li dediĉis al la difinado de "neŭtrale-homa religio", kiu transcendu ĉiujn rasajn kaj religiajn barojn, alvokante la homojn senti sin unuavice anoj de la homaro kaj nur duavice membroj de iu nacio aŭ adeptoj de religia kredo. Jam antaŭ ol Zamenhof en sia *Deklaracio pri homaranismo* (1913) definitive formulis siajn gvidprincipojn — kondamnon de nacia orgojlo kaj religia hipokriteco kaj pledon por oboe al baza universale valida etika regularo —, la unuaj rusaj esperantistoj fervore kontribuis al la disvastigo de la ideoj de Lev Tolstoj, kies pledon por perreligia reformo de la socio kaj por senperforta rezisto kontraŭ la cara reĝimo ili trovis facile harmoniigebla kun la popolinterfratiga celado de Zamenhof.

Aliflanke, la ekstrema idealismo de la Esperanto-pioniroj en la aŭtokrata Ruslando ne estis samgrade akceptebla por homoj en okcidenta Eŭropo. Kiam Esperanto komencis gajni terenon ankaŭ tie, la gvi-



Hector Hodler (1887-1920), fondinto de UEA: intima ligo de Esperanto kun la movado por starigo de paca ordo internacia.

don de la movado transprenis francaj intelektuloj, kiuj atendis de Esperanto praktikan utilon por la internaciaj rilatoj en la kapitalisma epoko. Kvankam ankaŭ ili en sia plimulto tendencis al pacifismo, la speciala homfratiga retoriko, kiun uzis la rusaj espe-

rantistoj sur la fono de la intergenta malamo en Ruslando, estis al ili fremda. Precipe la sinkretismajn ideojn de Zamenhof ili konsideris ĝenaj por la plua disvastigo de Esperanto en la progresinta okcidento. Sub la influo de la francaj gvidantoj, dum la Unua Kongreso de esperantistoj en Boulogne-sur-Mer (1905) estis akceptita Deklaracio, kiu nomis esperantisto ĉiun personon, "kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas", kaj deklaris la oficialan Esperanto-movadon nerespondeca pri "ideo aŭ espero", kiun individua persono ligas kun Esperanto.

Kvankam tiu Deklaracio do teorie sankcias la uzon de Esperanto por kiu ajn celo, eĉ por tute ne "pacakcela", la granda plimulto de la esperantistoj tamen ĉiam opiniis, ke Esperanto estas pli ol nur lingvo — ke, kontraŭe, ĝi samtempe simbolas la naturan asiron de la homaro al paco. Tian komprenon pri "interna ideo" de Esperanto precipe Zamenhof tenis vivanta, rifuzante limigi la aplikon de la lingvo al nuraj komercaj bezonoj; li postulis en sia inaŭgura parolado dum la Kongreso en Cambridge (1907): "... ĉio, kio, neniun ofendante, povas krei pacan *ponton* inter la popoloj, tio ne sole ne devas esti timeme evitata en niaj kongresoj, sed kontraŭe ĝi devas esti ĝuste la *esenco* de niaj kongresoj..."

Efektive, jam en la unua jardeko de la nova jarcento ekzistis ampleksa pacifisma literaturo en Esperanto, kiu analizis la ekonomiajn kaj sociajn radikojn de la tutmonda malpaco kaj pledis por la perinstitucia garantiado de la paco. Ekde 1905 aperis la revuo *Espero Pacifista*. Konataj pacifistoj estis inter la unuaj aŭtoroj de Esperanto-lernolibroj por siaj samnacionoj, kiel la slovako Albert Ŝkarvan kaj la aŭstro Alfred Hermann Fried, la Nobelpremiito de 1911, aŭ ludis gravan rolon en la sialanda Esperanto-movado, kiel la brito Felix Moscheles kaj la germano Georg Arnhold. Al la unuaj esperantistoj en Francio apartenis Gaston Moch, aktivulo en la Dreyfus-ana "Ligo por la Homaj Rajtoj", kiu en 1894 estis ekŝiĝinta el la armeo por dediĉi sin de tiam al la batalo por paco kaj demokratio.

Restis tamen kontraŭdiro inter la koncepto pri lingvo servanta ĉiajn celojn (laŭ la Deklaracio de Boulogne) kaj la postulo de Zamenhof, ke per Esperanto necesas unuavice "kulturi la flamon de homara sindono kaj espero". Sukcesa provo se ne solvi, almenaŭ mildigi tiun kontraŭdiron estis la fondo de Universala Esperanto-Asocio en 1908. Fondita de la juna sviso Hector Hodler, UEA ĝis hodiaŭ restas la reprezenta organizaĵo de la Esperanto-movado. Ĝi ofertis, unuflanke, per starigo de tutmonda delegita reto al la membroj siajn servojn por la uzo de Esperanto por plej diversaj celoj kaj en tiu senco pligrandigis la praktikan utilon de la lingvo; aliflanke, ĝi transprenis — en pli realisma formo — la originan

idealismon de Zamenhof, difinante la "esperantismon" kiel "praktikan internaciismon", kiu celas ne nur plifaciligi la rilatojn inter la *nacioj*, sed esti avangardo en nova, pozitiva fazo de internaciismo. Hodler emfazis, ke ne eblas konsideri la mondlingvan problemon sendepende de aliaj sociaj problemoj; li nomis la esperantismon "precipe socia, konstrua kaj progresema movado", kiu klopodu kunigi *homojn* sendepende de iliaj nacieca, lingva kaj rasa apartenoj. La sorton de Esperanto Hodler vidis "intime ligita kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia" kaj tial postulis de la membroj de UEA aktivan lukton kontraŭ la "interŝtata anarkio".



Edmond Privat (1889-1962), lia edzino Yvonne kaj Mahatma Gandhi, sur ŝipo de Londono al Hindio, 1931: forta subteno de Ligo de Nacioj.

La fondo de UEA kondukis al pli profunda kompreno de la Esperanto-movado pri la kompleksaj radikoj de la internacia malpaco kaj pri la politikaj rimedoj necesaj por kontraŭbatali ĝin. En la organo de UEA jam dum la Unua Mondmilito aperis vojonmontraj artikoloj, en kiuj oni alvokis al enkonduko de novaj juraj reguloj en la interŝtataj rilatoj kaj en kiuj kiel ĉefaj principoj de la postmilita rekonstruo estis nomataj "nacia libereco, demokratia rego, internacia ŝtatligo". Aldone al tio, Hodler klarvide atentigis, ke "vivpova estos tiu Ligo de Nacioj nur, se ĝi kunigas ne sole registarojn per juraj aranĝoj, sed ankaŭ kaj ĉefe popolojn per spirito de reciproka kompreno". Simile, ankaŭ Zamenhof en siaj lastaj vivojaroj akiris pli realisman komprenon pri la efektiveblo de siaj altaj idealoj, koncentrante sin al aktualaj, urĝe alfrontendaj taskoj: En memorando al la Kongreso de Rasoj en Londono (1913) li akcentis la neceson de interrasa toleremo kiel antaŭkondiĉo por la malebligo de internaciaj konfliktoj, kaj en "Alvoko al la diplomatoj" (1915) li ne nur argumentis por la plena memdecidrajto de la nacioj kaj la certigo de la plenaj demokratiaj rajtoj de la civitanoj interne de tiuj nacioj, sed ankaŭ proponis starigi Tut-eŭropan Tribunalon, kiu decidu pri la reguligado de konfliktoj. Por pli fora estonteco Zamenhof

antaŭvidis la kreon de Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo.

Post la fondiĝo de Ligo de Nacioj, la organo de UEA aperigis multajn artikolojn apoge al ties celoj kaj agadoj. Tiuj alvokoj venis ĉefe el la plumo de Edmond Privat, redaktoro de la organo kaj de 1924 ĝis 1928 prezidanto de UEA, kiu verkis ankaŭ librojn similtendencajn en Esperanto, ekz. *Interpopola konduto* (1935); Privat, amiko de Mahatma Gandhi kaj Romain Rolland, ĝuis ekster la Esperanto-movado altan reputacion kiel publicista pledanto por la sendependiĝo de Pollando kaj Hindio. Siaflanke, ankaŭ Ligo de Nacioj rekonis la potencialojn de la Esperanto-movado. Ĝia anstataŭa ĝenerala sekretario Inazō Nitobe nomis Esperanton "motoro de internacia demokratio", kaj oficiala raporto de Ligo de Nacioj pri *Esperanto kiel internacia helpa lingvo* (1922) konklude konstatis:

"Lingvo estas potenca forto, kaj la Ligo de Nacioj havas ĉian kaŭzon por observi kun aparta intereso la progreson de la Esperanto-movado, kiu, se ĝi fariĝos pli disvastiĝinta, povos iam konduki al grandaj rezultoj el la vidpunkto de morala unueco de la mondo."

Tiajn atendojn nutris la fakto, ke en la 1920aj jaroj dekmiloj da homoj lernis Esperanton. La lingvo ebligis al tiuj homoj ne nur la rektan interŝanĝon de pensoj kun diversnacioj super la lingvaj baroj, sed ankaŭ ligiĝis kun espero je pli justa socia ordo, kiel tio estis aparte rimarkebla inter laboristoj. En 1921 estis fondita speciala organizaĵo, Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu dediĉis sin al la internacia edukado de la proletaro per Esperanto; ĝia ĉiusemajna revuo *Sennaciulo*, en kiu ordinara homoj el ĉiuj mondopartoj senafekte rakontis pri siaj vivkondiĉoj kaj personaj zorgoj kaj plezuroj, havis gravan multobligan efikon, ĉar el ĝia enhavo ĉerpis centoj da naciolingvaj gazetoj. Kongresoj, multnombra literaturo, la instruado de Esperanto en lernejoj de pluraj landoj, amaskursoj por laboristoj — ĉio ĉi dokumentis la grandan popularecon de la lingvo kaj same de la per ĝi esprimitaj tendencoj al internaciismo en la 20aj kaj fruaj 30aj jaroj.

Kun la antaŭenmarŝo de faŝismo ankaŭ la Esperanto-movado devis suferi grandajn batojn. En 1936 Hitlera Germanio malpermesis la pluan disvastigon de la lingvo, kiun la nazioj rigardis "lingvo de komunistoj" kaj krom tio proksime ligita kun "judaj popolinterfratigaj iluzioj". Nur unu-du jarojn poste ankaŭ en Soveta Unio la Esperanto-unuiĝo estis disbatita kiel "internacia spiona organizaĵo"; la tre vigla internacia korespondado, per kiu la sovetaj esperantistoj tenis kontakton kun la cetera mondo, estis perforte haltigita. En tiuj persekutoj miloj da esperantistoj pereis; ankaŭ anoj de la familio Zamenhof estis viktimoj de la nazia teroro en Pollando.

Post la Dua Mondmilito, dum kiu la aktivado por Esperanto preskaŭ estingiĝis, UEA estis restarigita kiel asocio konsistigata kaj de la plej multaj naciaj Esperanto-asocioj kaj de rekte aliĝintaj individuaj membroj. UEA troviĝis inter la unuaj internaciaj organizaĵoj, kiuj proklamis sian akordiĝon kun la celoj de Unuiĝintaj Nacioj: Jam meze de 1947, proksimume unu jaron kaj duonon antaŭ la akceptiĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (10a de decembro 1948), la Asocio aldonis al sia Statuto aliancon, laŭ kiu "la respekto de la homrajtoj estas por ĝia (de UEA) laboro esenca kondiĉo". Per tio UEA pli klare ol antaŭe elstarigis, ke ĝia neŭtraleco en rilato al politiko, raso kaj religio ĉesas tie, kie okazas malobservoj de la fundamentaj homaj rajtoj kaj minacas tendencoj malamikaj al la evoluo de paco kaj internacia kunlaboro.

Konsekvence, en sia agado en la ekstera mondo UEA, kiu ekde 1954 havas konsultajn rilatojn kun Unesko, apogas ĉiujn tendencojn, kiuj fortikigas la observadon de la homaj rajtoj kaj la plibonigon de la rilatoj inter la nacioj. Al ĝiaj agadoj apartenas kampanjoj, organizitaj de UEA — denove en akordo kun iniciatoj de UN — en la Jaro de Homaj Rajtoj (1968), okaze de la Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion, en la Monda Komunika Jaro (1983) kaj en la Internacia Jaro de Paco (1986). Per la partopreno en kampanjoj celantaj al kreo de pli paca kaj solidareca

Foto: Nguyen De Khanh



Esperantistoj aktivigas multflanke kaj tutmonde dum la Internacia Jaro de Paco, inkluzive de Vjetnamio (supre) kaj Brazilo.

Foto: Roberto Resende



mondo UEA demonstras sian ligitecon al la Ĉarto de UN. Samtempe, la specifa profilo de UEA ĉiam restas gardata en tiuj aktivadoj: Per sia batalo kontraŭ lingva diskriminacio — unu formo de malobservo de la fundamentaj homaj rajtoj — kaj per sia pledo por plifaciligo de la interhoma komunikado kiel nerezignebla antaŭkondiĉo por efektiva paco kaj interkompreniĝo la Asocio ĝuste celas turni la

atenton de la publika opinio al problemaro, kiu restas neglektata en interŝtataj konferencoj kaj kiu ĝis nun ne okupis merititan lokon en la konscio de la monda publiko. Temas esence pri tio ĉi, kiel formulita de la multjara prezidanto de UEA, Ivo Lapenna: "...malmulto estis kaj estas farata por interkompreniĝo sur nivelo plej malalta, sed plej grava, la nivelo de la ordinara homoj. ... Ĉiam temis kaj temas nur pri la kunekzistado de la ŝtatoj kaj multe malpli, aŭ eĉ neniom, pri la amika, paca kunvivado de la popoloj, de la ordinara homoj." Informi la eksteran mondon pri ĝia postrestado rilate solvon de tiu ĉi aspekto de internacia kunlaboro kaj persiste daŭrigi siajn proprajn kontribuojn sur tiu kampo, restas la ĉefa tasko de UEA en la estonteco.

2. La praktika agado per Esperanto por paco kaj interkompreniĝo: kelkaj ekzemploj

2.1 Helpagado dum la militoj

Kiam eksplodis la Unua Mondmilito, Universala Esperanto-Asocio ofertis al la ĝenerala publiko siajn servojn por helpi al tiuj personoj, kiuj restadis en eksterlando kaj pro la militagoj estis malhelpitaj kontakti kun siaj parencoj en la militantaj landoj. La Centro de UEA en Ĝenevo deklaris sin preta por la interŝanĝo de privataj korespondaĵoj inter la malamikaj landoj; ĝi kolektis la korespondaĵojn ricevatajn pere de sia delegita reto, ordigis ilin laŭlande kaj laŭfakte kaj pluekspedis ilin, denove per siaj delegitoj en la diversaj landoj, al la adresitoj. La servopetoj tiamaniere ricevataj fine atingis la nombron de meze po 400 tage. Krom la perado de korespondaĵoj, la helpagado inkluzivis ankaŭ la serĉadon de personoj, sendadon de nutraĵoj, vestaĵoj kaj medikamentoj, rehejmigon de infanoj kaj helpon al militkaptitoj. La nombro de servoj, kiujn plenumis centoj da delegitoj de UEA kaj deko da libervolaj helpantoj en la UEA-Centro, estis pli ol 100 000 en unu jaro.

Dum la Dua Mondmilito la internaciaj Esperanto-organizaĵoj starigis similajn servojn. Jam en 1936 estis kreita t.n. "Esperantista Interhelpo", kiu helpis al viktimoj de la nazia teroro, precipe al judaj esperantistoj, eskapi el Germanio kaj aliaj landoj okupitaj de la nazioj. Dum la milito la perado de korespondaĵoj kaj de nutraĵoj al internigitaj personoj povis okazi el la neŭtrala Svislando nur en limigita skalo, ĉar la delegita reto ne estis tiagrade utiligebla kiel dum la Unua Mondmilito. Tamen, helpon eblis doni i.a. al internigitaj en Francio, nome al hispanaj ekzilitoj kaj judaj rifuĝintoj, kaj al la membroj de la familio Zamenhof en Pollando, antaŭ ol la eksterna politiko de la nazioj pereigis ankaŭ ilin. Post la milito la Esperanto-organizaĵoj faris valoran laboron por rekunigi disigitajn familianojn.

Notinda estas ankaŭ la informa laboro per Esperanto pri la teruroj de la milito: japanoj tradukis en Esperanton la unuajn detalajn raportaĵojn pri la suferoj de viktimoj de la atombombo en Hiroŝima kaj Nagasaki; retradukitaj el Esperanto en plurajn naciajn lingvojn, tiuj skuaj priskriboj atingis vastan legantaron en Eŭropo.

2.2 Eduka laboro


Nuntempe pluraj naciaj Unesko-komisionoj intense kunlaboras en la revizio de nacie uzataj instrulibrooj cele la forigon de stereotipoj kaj misprezentadoj de fremdaj landoj kaj popoloj. Sur tiu kampo, kiu estas aparte grava por la eduko al internaciismo, frue ekaktivis pedagogoj sciantaj kaj uzantaj Esperanton. En la 20aj jaroj francaj instruistoj iniciatis la kompilon de libro, kies celo estis senigi la instruadon de historio disde ŝovinismaj trajtoj; la materialo por tiu libro estis per Esperanto kolektita el 15 landoj. Notinda estis en pasko 1927 la konferenco "Paco per lernejo", kiun la ĝeneva Internacia Eduka Oficejo kunvokis al Praha. La preskaŭ 500 delegitoj el 19 landoj je la fino de la konferenco, en kiu Esperanto estis uzata kiel la sola traduk-lingvo, akceptis rekomendojn pri interŝanĝo de diversnaciaj lernantoj kaj pri la senŝovinismigo de lernolibroj.

En 1957 okazis en Jugoslavio Internacia Pedagogia Seminario pri la temo "Esperanto kaj lernejo". Tiu kunveno analizis la prezentadon de historio en diverslandaj instrulibrooj; en siaj konkludoj, la ĉeestantoj pledis i.a. por pli larĝa kaj pli objektiva konsidero de ekstereŭropa historio en eŭropaj instrulibrooj kaj sugestis, ke Unesko eldonu legolibrojn kun modelaj tekstoj internacie uzotajn apud naciaj lernolibroj.

En 1955 ekaperis 15-voluma verko *Infanoj de la mondo*, publikigita de japana eldonejo, en kiu infanoj el multaj landoj skribis pri si kaj sia vivo por japanaj infanoj. Granda parto de tiuj infanaj kontribuoj, precipe por la volumoj franca, germana, skandinavia, orienteŭropa kaj sudeŭropa, estis kolektitaj dank' al kunlaboro inter la japanaj redaktoroj kaj esperantistoj el la koncernaj landoj. Unika iniciato venis en 1956 de svisa instruisto: Li proponis kunligi klasojn de Esperanto-lernantoj per la eldono de interlerneja tutmonda gazeto, kiu entenu tekstojn en Esperanto kaj desegnaĵojn de 6- ĝis 15-jaruloj. La ideo estis favore akceptita, kaj en 1969 jam 36 klasoj el 16 landoj (*Grajnoj en vento*) kunlaboris por eldoni trifoje jare siajn kajerojn. Tiel la instruado de Esperanto jam ĉe infanoj vekas mensan transformiĝon el regiona aŭ nacia ekskluziveco en mondan vastecon, edukante ilin al ekkono pri la "fremdo" kaj al spirito de toleremo.

Apenaŭ necesas atentigi pri la kleriga funkcio, kiun plenumas la esperantlingvaj revuoj aperantaj en

preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo. Ili publikigas regule artikolojn, kiuj klopodas plifirmigi la konscion de la legantoj pri tio, ke estas ĉies respondeco helpi en la solvado de mondaj problemoj — malmarmado, lukto kontraŭ malsato, sekurigo de la homaj rajtoj, forigo de rasismo kaj de ĉiuj formoj de kultura diskriminacio. La Esperanto-revuo ankaŭ argumentas, ke en internaciaj organizaĵoj kaj en interŝtataj traktadoj grandegaj monsumoj forkonsumiĝas nur por interpretado kaj tradukado — sumoj, kiuj povus esti pli taŭge elspezataj por aliaj celoj, se la organizaĵoj kaj registaroj konvinkiĝus pri Esperanto kiel efika kaj malmultekosta solvo de la lingvo-problemo.



Grajnoj en vento: kovrilpaĝo de ĉiuj kajeroj, unua rondo (ĉi tiu el 1962). Peris kontaktojn inter infanoj el 16 landoj.


UEA jam de pli ol tri jardekoj kunlaboras kun Unesko, kun kiu ĝi havas konsultajn rilatojn. Ĝi eldonis Esperantan tradukon de la Unesko-eldonaĵoj *Oriento kaj Okcidento* — al reciproka kompreno? kaj *Rekomendo pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj*. Sub la aŭspicio de UEA aperas la prestiĝa Serio Oriento-Okcidento, en kiun eniris Esperanto-tradukoj de reprezentaj ĉefverkoj el ambaŭ hemisferoj, i.a. *Dia Komedio*, *Kalevala*, *Korano*, *Martin Fierro* kaj verkoj de Shakespeare, Baudelaire, Tagore kaj Kawa-bata.

2.3 Universalaj Kongresoj

La ĉefaj manifestacioj de la Esperanto-movado estas la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kiujn organizas UEA ĉiujare. Ili celas ne nur pridiskuti internajn aferojn de la Asocio, sed ofertas al meze 2 000 kongresanoj el la tuta mondo ampleksan kaj varian programon — ekde sciencaj prelegoj kaj diskutrondoj ĝis teatro-prezentadoj kaj oratoraj konkursoj. La sola kongresa lingvo estas Esperanto — kaj sekve tie mankas tiu karakteriza sento de malpli-valoro, kiun ofte havas kongresa delegito, kies gepa-

tra lingvo ne apartenas al la laborlingvoj de kongreso: kiam, nome, li/ŝi estas psikologie bremsata samgrade interveni en la debatojn kiel la parolantoj, kies nacia lingvo estas "oficiala".

Kutime, la Universalaj Kongresoj dediĉas sian laboran parton al la pridiskuto de unu ĉeftemo, ekz. "Esperanto kiel instrumento de internacia konceptado de la mondo" (Wien, 1970), "Monda turismo kaj lingva diverseco" (Portland, 1972), "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo" (Hamburg, 1974), "Rajto je komunikado" (Reykjavík, 1977), "Interkompreniĝo, paco, evoluo" (Pekino, 1986). El tiuj diskutoj rezultas resolucioj, kiuj postulas i.a., ke la registaroj akceptu la konvenciojn, kiuj rilatas al la homaj rajtoj, kaj ratifu la koncernajn paktojn, aŭ emfazas, ke "ĉiuj ajn metodoj



大会议题是：
相互了解、
和平、
发展。

Interkompreniĝo, paco, evoluo: la temaro de la 71a Universal Kongreso de Esperanto, okazinta en Pekino dum la Internacia Jaro de Paco.

aplikataj en edukado al internacia kompreniĝo devas aŭ resti senefikaj aŭ doni nur minimumajn rezultojn, se oni ne venkas la lingvan obstaklon kiel fundamentan baron al interhoma komunikado de la popoloj amasoj".

Ke la kontribuo de la Kongresoj al eduko en spirito de internacieco renkontas ĉiam pli da rekono, atestas la kreskanta nombro de registaroj, kiuj delegas siajn oficialajn reprezentantojn al la kongresaj inaŭguroj.

2.4 Personaj kontaktoj

Kiel la Kongresoj, tiel same multnombraj naciaj kaj regionaj aranĝoj servas al sciantoj de Esperanto kiel forumo por renkontiĝado, interkonatiĝo kaj opiniinterŝanĝo. La junulara sekcio de UEA organizas regulajn seminariojn kaj feriosemajnojn por gejunuloj; ĝi starigis ankaŭ servon, kiu peras la ĉeffamilian restadinterŝanĝon en diversaj landoj. Entute, de post la milito konsiderinde kreskis la parola uzo de Esperanto: La plifaciligo de turismo pligrandigis la valoron de la lingvo kiel praktika komunikilo inter diversnaciaj popoloj el ĉiuj sociaj tavoloj, kiuj tiamaniere ofte troviĝas en privilegia pozicio kompare

kun la meza turisto. Nacilingvaj libroj, kiuj priskribas vojaĝon eksterlanden per Esperanto, dokumentante la lernprocezon estigitan per tiaj vojaĝoj, estis, ekz. en Japanio, tre sukcese disvendataj.

La multaj personaj kontaktoj, kiujn ebligas la scio de Esperanto, konsistigas la plej stabilan bazon de la Esperanto-movado. Ili restas por la parolantoj de la lingvo ankoraŭ simile inspira travivaĵo kiel tiu, kiun havis la partoprenantoj de la Unua Kongreso en Boulogne-sur-Mer — kiam tie, laŭ la vortoj de Zamenhof en 1905, "kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj". La formoj kaj enhavo de tiuj kontaktoj kompreneble tre varias; estas malfacile mezuri ilian amplekson kaj analizi ilian efikon. Ĉiuokaze, ne temas nur pri rektaj renkontiĝoj, en kiuj Esperanto estas parolata. Por multaj, la utiligo de la lingvo okazas unuavice en la formo de korespondado. La signifo de la opiniinterŝanĝo trans landlimojn per esperantlingvaj leteroj apenaŭ povas esti trotaksata. Nur tiu, kiu mem informiĝas ĉe esperantistoj, povas ricevi impreson pri tio, kiom da valoro kaŝiĝas en la internacia korespondado, en tiu tre intima formo de praktika apliko de Esperanto, kaj kian lernigan funkcion — en la senco de akiro de pli da kompreno por la diverseco kaj respektindeco de kulturoj — havas la korespondado.

Ekster oficialaj kanaloj kaj preskribitaj formoj de komunikado, ankaŭ preter la abstraktaj paroloj pri paco kaj interpopola amikeco kaj la edifaj resolucioj pri la kontribuo de Esperanto al tutmonda solidareco, ĝuste sur la nivelo de la personaj kontaktoj reliefigas la konturojn de tio, kion oni povas nomi la praktikata internaciismo de la esperantistoj.

3. Konkludo

La Preamblo de la Konstitucio de Unesko akcentas, ke militoj komenciĝas en la mensoj de la homoj kaj ke la mensoj estas la loko, kie oni devas unue konstrui la defendon de la paco. Universal Esperanto-Asocio ne nur laŭ la formale proklamitaj principoj de agado en la Statuto, sed laŭ sia tuta laboro en la praktiko faras precize tion: ĝi konstruas la bazojn de la paco en la mensoj de la homoj. Tion jam rekonis Rezolucio de Unesko de la 10a de decembro 1954, en kiu estas notitaj "la rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo". En 1985, la 23a Ĝenerala Konferenco de Unesko memorigis pri la progresoj, kiujn Esperanto intertempe faris, kaj esprimis rekonon al la "grandaj eblecoj, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj".

Ulrich Lins

SAT festos la Jubileon en Bulonjo-sur-Maró

Unuafoje post 52 jaroj Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) denove kongresis en Hispanio. La kongreson, laŭvice la 59an, gastigis la urbeto Sant Cugat del Vallès apud Barcelono de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto. La 190 partoprenantojn el 13 landoj bonvenigis en la malfermo la urbestro, s-ro Oriol Nicolau.

La laborojn de la kongreso markis la 50a datreveno de la hispana intercivitana milito. Pri tiu periodo temis ankaŭ duono de la kongresaj prelegoj. Kompreneble oni ne povis forgesi la aktivan partoprenon de diverslandaj esperantistoj kaj la utiligon de Esperanto dum la tiamaj eventoj. La traktadon de la temo persone ĉeestis homoj, kiuj aktivis en la respublikana movado, i.a. s-ro Vicente, kiu dum la milito esperantigis tekstojn por Barcelona Radio.

Okazis ankaŭ prelegoj pri Esperantaj temoj. En la arta vespero ravis la publikon Mariona, profesia kantistino kaj muzikverkistino, kiu prezentis kantojn en Esperanto el la ĵus eldonita *Eklektika kanzono*.

naro internacia. Dum tuttaga ekskurso oni vizitis la monton Montserrat kaj la Hispanan Esperanto-Muzeon en Sant Pau d'Ordal, kie la fondinto mem de la muzeo, s-ro Luis Hernandez Yzal (iama ĉefdelegito de UEA), prezentis siajn kolektojn.

La ĉi-jara kongreso de SAT estis escepte sukcesa el la vidpunkto de ekstera informado. Krom artikoloj en la gazetaro, kaj la Kataluna kaj la Hispana Televido sendis filmistojn al ĝi kaj pluraj radiostacioj informis pri ĝi.

Kvankam la aparta konferenceto de SAT-junulfako ne sukcesis — ĝi havis apenaŭ 10 partoprenantojn — en la 59a SAT-kongreso aperis pli da gejunuloj ol kutime en la lastaj jaroj. Tio instigis la kongreson substreki en sia gvidrezolucio la gravecon de specialaj junularaj programoj en la estontaj kongresoj de SAT.

Anstataŭ kongresi en la Jubilea Jaro en Pollando — konforme al la siatempa invito de PEA, kiu tamen poste nuligis ĝin — SAT-anoj nun faris trafan decidon kongresi en Bulonjo-sur-Maró, de la 22a ĝis la 29a de aŭgusto 1987. En la urbo de la Unua Universala Kongreso, kiun oni cetere elektis el inter kvin urboj-kandidatoj, SAT havos ŝancon tiri pli da atento al si kaj al Esperanto, ol ĝi estus havinta kun kongreso en Pollando, inundota venontjare per deko da Esperantaj kongresoj kaj konferencoj. **ob**

FAKA AGADO

ILEI antaŭ nova epoko?

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazigis sian 20an konferencon de la 12a ĝis la 19a de julio 1986, en la Katolika Universitato de Louvain-la-Neuve (Belgio). Ĉeestis 69 membroj kaj 5 vizitantoj el 13 landoj, inkluzive de la tiamaj prezidanto de UEA, Grégoire Maertens, kiu partoprenis la malfermon kaj fermon.

Interesa kvaropa temaro diskutigis la partoprenantojn pri diversaj flankoj de la laboro de ILEI. Sub la temo "Eduk-pedagogiaj problemoj" okazis prelegoj pri lingvo kaj paco (I. Szerdahelyi); nova lernmetodo el Nederlando, "Esplorkreiva vojo" (O. Hoekstra); didaktikaj ludoj kaj ludiloj (G. Sossois); instruado per komputilo (R. Gerard); enkonduko al la projekto DLT en Utrecht (E. Van Damme); la Lerneja Projekto de UEA (A. Staes); la pedagogia-metodika kurso por rajtigi Esperantokursgvidantojn (I. Szanzer); kaj konsiloj pri la Csehmetodo (A. Childs-Mee).

Krom aparta kulturprogramo, la cetero de la Konferenco koncernis la internan kaj eksteran aktivadon de ILEI. Diskutoj pri ĉiuj internaj organizaj problemoj okazis surbaze de sep labordokumentoj verkitaj de la vicprezidanto E. Symoens: Internacia Pedagogia Revuo (IPR); Strukturoj de ILEI; ILEI-Konferencoj; Informado en pedagogiaj kaj edukaj medioj; Eldonaĵoj de ILEI; Kunlaboro kun Terminologia Centro de UEA; Listigo de ĉiuj lernejoj Esperanto-kursoj en la mondo. Pri la informada strategio, oni decidis — almenaŭ principe — organizi ampleksan inform-kampanjon en pedagogiaj kaj edukaj medioj, kiu estas detale pristudota dum venontaj monatoj. Same oni akceptis proponon de G. Pirlot kunmeti liston de ĉiuj oficialaj lernejoj Esperanto-kursoj, je ĉiuj niveloj.

La konferenco elektis kvar novajn honorajn membrojn: Marcel Erbetta (Svislando), Irja Klemola (Finnlando), Olle Olsson (Svedio), kaj Jozef Toczyński (Pollando). Stariĝis ankaŭ du laborkomisionoj en la sino de ILEI: statistiko, sub gvidado de Germain Pirlot (Kemmelsbergstraat 5, b.3, B-8400 Oostende, Belgio), kaj didaktikaj ludoj kaj ludiloj, sub George Sossois (Rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin, Belgio). Interesitoj povas turni sin al tiuj personoj por peti aŭ transdoni informojn.

Resume, ĉi tiu estis tre fruktodona konferenco kiu inaŭguris novan epokon por ILEI, des pli ke la estonta aktiva kunlaboro kun UEA ebligis realigon de pluraj komunaj projektoj. La Konferenco ricevis vastan diskonigon pere de du televidaj kaj du radio-dissendoj, kaj krome aperis informoj en pluraj flandraj kaj francelingvaj ĵurnaloj.

E. Symoens

Afrikaj studentinoj diplomigis ĉe AIS

Du studentinoj, el Tanzanio kaj Zimbabvo, sukcese trapasis la lastajn ekzamenojn dum la Tria Samarina Universitata Sesio (SUS) por magistriĝi ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj. Ili fariĝos la unuaj, kiuj origine diplomigis ĉe AIS, kies unu — kaj praktike la ĉefa — laborlingvo estas Esperanto. La nombro de t.n. adaptaj adoptoj de jam akirita universitata grado kreskis dum SUS 3 al 39.

SUS 3 okazis de la 30a de aŭgusto ĝis la 8a de septembro kun partopreno de ĉ. 70 sciencistoj kaj studentoj el 20 landoj. Dum ĝi realiĝis tri kursoj en la kibernetika, du en la humanistika, unu en la strukturscienca kaj tri en la naturscienca sekcioj de AIS. Krome okazis unuopaj prelegoj kaj tri rapidkursoj de Esperanto por sciencistoj.

Nova iniciato de AIS, per kiu ĝi kontribuos al la centjariĝo de Esperanto, estas aperigo de dokumentaro pri vivantaj sciencistoj, kiuj almenaŭ skribe komprenas la Internacian Lingvon. Jam kolektiĝis informoj pri ĉ. 600 personoj. Interesitoj povas peti ĉi-koncernan demandilon ĉe la Sekretariejo de AIS, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn. Ĉe la sama adreso riceveblas ankaŭ la Unua Bulteno de SUS 4, kiu okazos de la 28a de marto ĝis la 6a de aprilo 1987. Detalaj informoj pri la Akademio, i.a. pri ĝia ekzamsistemo, troviĝas en la libro *Ekesto kaj celoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj*, kiu haveblas ĉe la Libroservo de UEA (prezo: 18,30 gld).

REAGOOJ

Epizodoj el la longa vivo de UEA-delegito

Instigita per la artikolo "*Delegitoj aktualas*", sed kun problemoj (*Esperanto*, p.46/1986), mi notis kelkajn okazaĵojn el mia vivo kiel delegito de UEA.

1) Jam en la jaroj antaŭ 1930 mi estis UEA-delegito en Braunau am Inn. Venis travojaĝanta esperantisto — en sia junaĝo elmigrinta polo — el Toronto survoje al Lwów por viziti patrinon post du- aŭ tridek jaroj. Mia fratino kaj mi ne estis hejme. Mia patrino — ankoraŭ ne lerninta la lingvon — donis al li bieron ne deziritan, pro nekomprene.

La duan tagon li forveturis. Poste li komunikis sian sorton. Por trovi la patrinon li ronddemandis. Tio kaŭzis suspekton. Li estis arestita kiel spiono. Pro tio li ne povis ĝustatempe atingi la ŝipon laŭ la revenbileto. Li grave malfruis al la laborejo, perdis la postenon kaj fariĝis senlaborulo.

2) Proksimume jaron post la ekrego de la nova reĝimo en Irano, rakontis al mi sinjorino (iam komencinta lerni Esperanton), ke kuzino de ŝi, edzino de iranano, ne aŭdigis sin dum naŭ monatoj. Ŝi estis tre maltrankvila. Mi konsilis: "Donu al mi ŝian adreson, kaj mi provos atingi kontakton." Kun la ricevitaj adreso kaj telefonnumero, mi skribis leteron al UEA-delegito en Irano. Post mallonga tempo mi ricevis respondon: "S-ino X bonfartas, mi tuj telefonis al ŝi. La kaŭzo de ŝia silento estis timo sendi lete-

ron al eksterlando." Tiun respondon mi transdonis al mia konatino, kiu tre ĝojis kaj dankis. Baldaŭ poste ŝi sin anoncis por Esperanto-kurso.

3) Antaŭ la Universala Kongreso en Aŭgsburgo, juna bulgaro deziris tranokti en Linz okaze de vojaĝo al la UK, sed prefere senkoste. Pli poste li skribis, ke li vojaĝos kun amikino, sekve temos pri du personoj. Per alia informo mi eksciis, ke li rekte iros al Aŭgsburgo, sed volas eventuale interrompi la reveturon en Linz. Ĉar mankis preciza klarigo, mi telegrafis al la Kongreso, sed restis sen respondo. Certan tempon poste mi ricevis poŝtkarton el Bulgario, ke li restis ĉe konatoj. Pro la afero mi devis resti hejme anstataŭ forveturi kiel planite.

4) En marto ĉi-jare, ricevinte leteron de "Antoni", mi iris al la oficiala registrejo de naskiĝoj, kie oni povas trovi, ke la 3an de aprilo 1943 estis naskita filo Anton de Maria Schepka (Czepka), kiu mem naskiĝis la 19an de marto 1922 en Nowe Sandez (Nowy Sacz).

Post pruvo, ke mi estis ŝtata oficisto, mi ricevis kontraŭ pago de la kostoj la naskodokumenton de tiu malfeliĉa juna homo serĉanta gepatrojn... Mi supozas, ke li estas adoptita kaj ne havas la patrinan nomon.

Nun mi daŭrigas la serĉadon helpe de Aŭstra Ruĝa Kruco kaj Radio Polonia (Varsovio).

Kvankam la ĉi-supraj aferoj ne estas "taskoj" de delegito, mi tamen plenumas ilin, ĉar esperantismo estas ankaŭ humanismo.

Oswald Haselbauer,
Delegito en Linz (Aŭstrio)



Novaj projektoj de Eduka Fondaĵo "Carson"

La kuratoroj de la Eduka Fondaĵo "Carson" ĉi-jare celis pli ol CDN\$9000 por subvencii la jenajn homojn kaj projektojn:

- D-ro Carmel Mallia (Malto) por ĉeesti porinstruistan kurson ĉe Pisanica, Bulgario;
- François Akpa (Benino) por okazigi Esperantajn kursojn por komencantoj en kvin urbetoj (vd. foto);
- grupo Pasporto (Kanado) por jubilejara projekto de Joëlle Rabu kaj tri aliaj muzikistoj;
- Klubo Tutmonda Amikeco (Malto) por ebliĝi aĉeton de Esperantaj libroj por Esperanto-Librejo en ŝtatlernejo;
- Wilma Eichholz (Kanado) por vojaĝkostoj por instrui oficialan eksterlandan Esperantan kurson;
- Ada Fighiera-Sikorska por la eldono kaj favorpreza vendado en evoluantaj franclingvaj landoj de moderna franclingva lerno- kaj legolibro;
- lernolibroj kaj vortlibroj por la Esperanto-Klubo en Kisangani, Zairio.

La Eduka Fondaĵo Carson bonvenigas proponojn kaj petojn por indaj edukaj projektoj. Por pritrakti ĉiun peton, la kuratoroj bezonas detalan priskribon pri la projekto, la datojn de komenco kaj fino de la projekto, la buĝeton, kaj la proksimuman grandecon de la subvencio bezonata (en kanadaj dolaroj). Neniu peto estos traktita sen ĉi tiu informo. Limdatoj estas 15 septembro kaj 15 marto. Por peti subvencion, kontaktu la Edukan Fondaĵon "Carson", 1339 Hamilton St. N.W., Calgary, Alberta, Kanado T2N 3W8.

Anne Whittaker

Pri unueco kaj logiko

En la julia-aŭgusta numero de la revuo aperis recenzo de la finna lingvisto Jouko Lindstedt pri verko de Richard Schulz, Pledo por unueca lingvo (Esperanto, p.131/1985). Venis kelkaj leteroj, kiuj kritikis la iom akran tonon de la recenzo, kaj ni aperigas du reprezentajn sube. Ni tamen atentigas, ke ni ne celas malfermi debaton pri la enhavo de la koncerna verko.

Mi ne konas la libron de Ŝulco, sed mi preferas legi recenzon kiu lasas la decidon pri aĉeto tute al la leganto. Maksimume, recenzo stimulu aĉetadon, anstataŭ malaĉetadon kiel tiu de Lindstedt... La esprimo "Pledo" ŝajnas al mi tute ne demagogia, male, pli modesta ol "plena". Oni devas bedaŭri, ke UEA stimulas la unuecon de la lingvo per ĉiunumera reklamado por unu certa gramatiko. Kaj nun per la demagogia ridindigo de alternativa skolo, per esprimoj kiel "la logiko kiu sin revelaciis unue al Luis Mi-mó kaj poste al Ŝulco", kvazaŭ temus pri profetoj de malaprobinda religio. La vero estas, ke Ŝulco dum tuta vivo, jam 80-jara, instruis lingvojn. Do voĉo atente aŭskultenda.

Strange: ĉiufoje kiam Lindstedt kredas montri idiotan opinion de Ŝulco, mi emas pravigi Ŝulcon. Mi vere ĉiam fieras kiam mi legas ke pliriĉigas nian kulturen klubeton iu aŭ unu profesia lingvisto. Sed la recenzon de Lindstedt mi ne povas rekomendi, kvankam legi ĝin espereble vin ne damaĝis.

Rob Vetter (Nederlando)

Ĝus elleginte la numeron julian-aŭgustan de Esperanto, mi petas vin pardoni al mi mallongan rimarkigon. Tre ofte uziĝas la nocio "logiko" en Esperantaj artikoloj, jam de la Zamenhofa konsilo/postulo, "En la lingvo internacia oni devas obei nur la logikon" (*La Esperantisto*, 1890). Sed miaopinie en nemalmultaj kazoj ĝia vera senco ne estas ĉiam klara, precipe se ĝi estas uzata sen aldono de specifa klarigo. Verŝajne ne estas tute neinterese, ke PIV entenas kvar difinojn, kiuj posedas konsiderinde grandajn senc-nuancojn inter si.

Rilate la recenzon pri "Pledo por unueca lingvo": s-ro Lindstedt, kiu sendube aspiras pri objektiveco, evidente ne scias, ke s-ro Schulz pritraktis la rilatojn inter "logiko" kaj "konvencio" en siaj *Vestfaliaj Flugfolioj*. Sendube liaj konkludoj ne estas ĝenerale akceptataj de la plimulto da esperantistoj-gramatikistoj....

Cetere, ĝuste "tia ludo", kiu estas "nur por 'Ŝulco'... serioza afero" (t.e. esperantigo de propraj nomoj), estas rekomendita (por iuj kazoj) de mag. Auld en lia samnumera recenzo (p. 133).

Heinz Platzer (Aŭstrio)

Dorothy Henderson

Dorothy Henderson, unu el la plej gravaj mecenoj de UEA, mortis la 4an de majo en Ontario, Kanado. El ĉiuj ĉambroj en la Centra Oficejo en Roterdamo, unue ricevis sian nomon la Kanada Ĉambro pro ŝia malavara subteno. S-ino Henderson ne nur pagis por la ĉambro, sed ankaŭ donacis por la tie-lokita Biblioteko Hodler aparte kreitan lignan meblaron, sur kies seĝoj troviĝas la blazonoj de ĉiuj kanadaj provincoj.

Kiel filino de kunfondinto de General Motors, nun giganta internacia entrepreno, ŝi ja disponis pri pli da mono ol la plimulto da homoj. Tamen nur tre malofte riĉuloj disdonas sian monon tiel malavare, kiel Dorothy Henderson. Ne nur asocioj kaj multaj individuoj en Esperantujo ricevis monon de ŝi. Ŝi same malavare subtenis Asocion por Unuiĝintaj Nacioj, sian eklezion kaj multajn individuojn.

S-ino Henderson unue lernis Esperanton en mia Cseh-kurso, kaj poste sukcesis en kursgvidanta ekzameno kaj foje instruis la lingvon. Ŝi verkis ok librojn eldonitajn anglalingve, kaj ankaŭ multajn artikolojn, en kiuj ŝi ofte menciis Esperanton. Pri ŝiaj impresoj en la 46a UK ŝi sukcesis publikigi grandan artikolon en grava kanada ĵurnalo. Eĉ kiam ŝiaj fortoj ne plu permesis al ŝi mem aktivi, ŝi donacis monon por subteni nian agadon mondscale. Oni povas vere diri, ke la idealoj de Esperanto kongruis kun ŝia mondokoncepto.

V. Sindona Eichholz

Vaste pri verdulismo

Naturo kaj Socio (1984), Edgar Guhde (1936). Tradukis el la germana W. Gunther, C. Noll, G. Grunder. Paderborn: Esperanto-Centro, 1985. 169p. 21cm. Prezo: 22,50 gld.

En la lastaj jardekoj multe kreskis la konsciiĝo, ke nia hodiaŭa socio rapide eluzas, polucias kaj detruas la naturan medion, kaj elĉerpas la energio-fontojn. Tio neeviteble kondukos, jam en la venontaj jardekoj, al malagrablaj ŝanĝoj en niaj vivkondiĉoj.

Ankaŭ en sciencaj rondoj oni ekkonsciis pri tio. Konataj estas la studoj de la "Klubo de Romo" (tutmonda grupo de elstaraj sciencistoj). Ĝiaj raportoj (ĉ. 1970) vekis grandskalan maltrankvilon, precipe en sciencaj kaj gvidaj rondoj. Tamen ili malmulte atingis la ĝeneralan publikon.

Ekaperis tamen diversaj unuopuloj kaj grupoj de aktivuloj, kiuj per pli insistaj metodoj kontraŭbatalas la detruajn tendencojn. *Naturo kaj socio* vaste pritraktas ĉi tiun temon. Ĝi estas verkita en la formo de kurslibro por uzo ĉe seminario, enhavante diskutresumojn kaj ekzercojn surbaze de vasta literaturo. En la teksto la leganto estas superŝutata per abundo da avertoj, admonoj kaj riproĉoj, direktitaj al la individua homo, al la socio, al ties gvidantoj, al la in-



La Kanada Ĉambro, en la Domo de UEA, restos taŭga memorigaĵo pri Dorothy Henderson. La portreto sur la muro estas de ŝia patro, George William McLaughlin, al kies memoro ŝi dediĉis la ĉambron

dustrio, al la merkato-ekonomio. Amasas vortoj kun la finaĵo *-enda*. Tiu abundo eble ne kondukas al la dezirata akcepto.

Laŭ mia opinio, oni ne agnoskas juste la multon, kiun jam faris la registaroj por kontraŭbatali medio-detruon.

Pri la lingvaĵo: la originalo estis germanlingva, kaj tio estas facile konstatebla per la stilo kaj vortuzo en la traduko — longaj kaj komplikaj frazoj, kiujn oni foje devas relegi por kapti la sencon. Ankaŭ semantike la tradukado kaj terminologio ne estas senriproĉaj; sur ĉiun paĝon oni povus meti unu aŭ pliajn demandosignojn.

La ĉefa valoro de ĉi tiu verko, prezentita ĉe la UK en Augsburg 1985, tiel troviĝas en ĝia pritrakto de grava kaj aktuala temo.

W.J Nijveld

Pordoj al plena paŝado

Pordoj, Stefan MacGill (1948). Rotterdam: Stefeto, 1985. 84p. Ilus. Broŝ. 21cm. Prezo: 8,10 gld.

Pordo estas duflanka. Ankaŭ tiu ĉi libro de Stefan MacGill havas du flankojn: unuflanke, ĝi prezentas dek unu lingve facilajn skeĉojn, plejparte senprobleme surscenigeblajn; aliflanke, ĝi estas uzebla kiel lernilo en Esperanto-kurso. Paŝante de lingve pli facilaj al pli komplikaj skeĉoj, la aŭtoro aldonis al ĉiu skeĉo paroligajn demandojn kaj ekzercojn, kiuj adaptiĝas al la kreskanta lingva nivelo. Fine de la libro troviĝas vortlisto kaj notoj uzeblaj por kursgvidanto, kiuj klarigas la gramatikajn formojn uzitajn ankaŭ en la antaŭaj du sukcesaj libroj de la sama aŭtoro: *La laŭta vekhorloĝo* (preskaŭ elĉerpita) kaj *Tridek roluloj*.

Tiuj facilaj skeĉoj pri la aventuroj de gesinjoroj O. Fend, Larmla Vango, Monomank kaj la aliaj, kiuj devas batali kontraŭ pordoj, certe helpas al kursgvidantoj krei sukcese interesan kurson. La mallongaj porkomencantaj skeĉoj sur la unuaj paĝoj eble plej sukcesus ĉe pli junaj kursanoj kaj ŝatantoj de tipe angla humuro. Poste, la intrigoj fariĝas pli kompleksaj, kaj la aŭtoro montras sian kapablon konstrui suspense amuzajn situaciojn. Unu el la pli longaj teatraĵetoj, cetere jam premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA, povus estis surscenigita kursofine aŭ en "postkurso" por pli granda publiko.

Sed la libro estas aĉetinda ankaŭ por propra lego-amuzo aŭ kiel donaco, ĉar, kvankam broŝurita kaj krampita kiel kajero, ĝi estas grafike tre bela, ĉefe dank' al la klare kaj korekte kompostita teksto kaj la belaj ilustraĵoj de Katie Keates.

Martin Haase

Laste aperis...

Akademiaj studoj 1986, red. Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Esperanto Press, 1986. 304p. 29cm. ISBN 0 919186 30 0. Kolekto de esperantologiaj studoj kaj artikoloj, ĉefe represaĵoj, de 18 aŭtoroj. Prezo: 30,00 gld.

Artificial Language Movement, The, Andrew Large. Oxford: Basil Blackwell, 1985. 240p. 24 cm Bind. ISBN 0 631 14497 8. Historio de la internacilingva movado kaj priskribo de la plej gravaj lingvoprojektoj. Prezo: 105,00 gld.

Aŭtobiografio de bakterio, (1936), Gaŭ Ŝiĉji (1905). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 110p. 18cm. Rakonto pri bakterio vojaĝanta tra homa korpo, verkita de fama sciencpopulariga aŭtoro. Prezo: 3,90 gld.

Bibliografio de la publikaĵoj de Reinhard Haupenthal; Suplemento 1980-1986, Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1986. 12p. 20cm. Prezo: 3,90 gld.

Buchenwald. El la germana trad. G. Hornbogen k.a. 1985 (neindikita). 36p. Ilus. 21cm. Raporto pri la koncentrejo. Prezo: 1,80 gld.

Ĉina antologio (1919-1949). Diversaj tradukintoj. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 602p. Ilus. 21cm. Bind. 55 literaturaĵoj (noveloj, raportaĵo, eseoj kaj poemoj) de 43 plej reprezentaj verkistoj de sia tempo. Prezo: 21,00 gld.

Ĉinaj familiaj pladoj. El la ĉina trad. Liŭ Cajŝeng. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 69p. Ilus. 18cm. Feniksa libraro. Receptoj de ĉinaj specialaĵoj. Prezo: 4,20 gld.

Ĉinlingva konversacio, komp. Lu Ĉŭanbjaŭ (1938). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 72p. 18cm. Frazlibro por kutimaj turistaj bezonoj, kun indiko de la prononco. Prezo: 4,20 gld.

Deklaro de Ĝenerala Sekretario de CK KPSU Miĥail Gorbaĉov 1986-01-15. El la rusa trad. E. Ŝevĉenko kaj L. Novikova. Moskvo: Eldonejo de Presagentejo Novosti (APN), 1986. 14p. 19cm. Prezo: 1,20 gld.

Dia Patrino parolas en Medjugorje, La, Vinko Ošlak. Klagenfurt/Celovec: Eldonejo de s. Hermagoro, 1986. 98p. Ilus. Mapo. 21cm. ISBN 3 85013 C56 8. Priskribo de la aperoj de la Dipatrino Maria al ses infanoj. Prezo: 17,40 gld.

Enciklopedio de Esperanto, (1933-35), red. L. Kökény (1897-1985), V. Bleier (1903-1940), K. Kalocsay (1891-1976), I. Ŝirjaev (1877-1933). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986 (fotorepreso). 600p. 24cm. Bind. ISBN 963 571 164 6. La plej riĉa movada konsultlibro produktita antaŭ *Esperanto en perspektivo*. Prezo: 45,00 gld.

Esperanta ĥorkantaro. Motala: Motala Esperantoklubb, 1985. 14p. 27cm. Muziknotoj kun tekstoj de 12 kantoj, i.a. pri Esperanto. Prezo: 8,70 gld.

Esperanto, H. Raŝidi. Maŝhad: Eldona Organizo, 1986. 65p. Ilus. 21cm. Baza lernolibro en 20 lecionoj por perslingvanoj. Prezo: 12,00 gld.

Esperanto; Lernolibro de la Internacia Lingvo. B — daŭriga kurso, Div. aŭtoroj. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1986. 42p. 20cm. Klarigoj kaj vortlistoj en Esperanto kaj la kroatserba. Progresiga lernolibro en la serio de la zagreba metodo. Prezo: 9,90 gld.

Esperanto-Fernstudium in 14 Lektionen, Ludwig Schödl. Berlino: Kulturbund der DDR Esperanto-Verband, 1983. 56p. Ilus. 21cm. Koresponda kurso. Prezo: 3,90 gld.

Esperanto keele õpik (1973), Jaan Ojalo (1914). Tallinn: Valgus, 1986 (2a eld. reviziita). 182p. 20cm. Bind. 27-leciona lernolibro kun instrukcioj por instruisto kaj ampleksa vortaro Esperanto-estona. Prezo: 8,40 gld.

Esperanto-societo "Bude Borjan"; 1945-1985, Div. aŭtoroj. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1985. 20p. 20cm. Historieto en la lingvoj kroatserba kaj Esperanto. Prezo: 6,60 gld.

Esperanto; Za ŝole in teĉaje, I-a parto, Rudolf Rakuŝa. Ljubljana, 1984. 180p. 20cm. Prezo: 14,10 gld.

Ĝardenfesto kaj la Insulo de Voĉoj, La; Katherine Mansfield kaj Robert Louis Stevenson. El la angla trad. E. Lymburn (La Ĝardenfesto) kaj R. Dearnley (La Insulo de Voĉoj). Wellington: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, 1985. 22p. 21cm. Prezo: 3,60 gld.

Historio de la Esperanto-movado en Israelo (represo el Israela Esperantisto, 1982), A. Wandel (1954). Jerusalemo: Sivron, 1986. 8p. 15cm. Prezo: 2,10 gld.

Homaranismo; A idéia interna, Délio Pereira de Souza. Rio-de-Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1983. 90p. 21cm. Portugallingva studo pri la interna ideo de Esperanto kaj pri la homaranismo de Zamenhof. Prezo: 3,60 gld.

Homo (1962), Eduardas Mieželaitis (1919). El la litova trad. Petras Čeliauskas. Vilnius: Vaga, 1986. 94p. Ilus. 20cm. Bind. Ĉefverko de renoma popola litova poeto. Prezo: 4,80 gld.

Hura! Ne romano, nur grimaco (1930), Julio Baghy (1891-1967). Postparolo de Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986 (2a eld.). 438p. 19cm. Bind. ISBN 963 571 167 0. Satira-filozofia socikritika romano kun tre komplika intrigo. Unu el la ĉefverkoj de la Esperanta beletro. Prezo: 36,00 gld.

Interfrigo; Internacia transporta merkato de facile pereemaj varoj — komuna aktiveco de eŭropaj fervojoj en kadro de la societo Interfrigo, Gvozden Srediĉ (1935). Beogrado/Skopje, 1986. 24p. Ilus. 20 cm. Prezo: 5,10 gld.

Internacia kiso; 25 jaroj de drama sekcio de Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb, red. Zlatko Tišljarić (1945). Zagrebo: Studenta Esperanto-Klubo, 1985. 34p. Ilus. 21cm. Kronologia historio kun listo de la ĝisnuna repertuaro kaj teksto de la teatraĵo *Stilaj ekzercoj*, laŭ la ideo de R. Queynay adaptita de Z. Tišljarić. Prezo: 9,90 gld.

Internationale Plansprachen; Eine Einführung, Detlev Blanke (1941). Berlino: Akademie-Verlag, 1985. 408p. 21 cm. ISSN 0138 550 X. Serio Sprache n-ro 34. Rigora kaj detala enkonduko en planlingvistikon kun ampleksa bibliografio. Prezo: 48,00 gld.

Iom pri la mensa sinpreparo, J. Novák kaj I. Spička. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1985. 34p. 20cm. Pri sinpreparo antaŭ praktikado de rompumatakoj. Prezo: 4,50 gld.

Kantareto, komp. F. Šlabek kaj G. Srediĉ. Beogrado/Skopje, 1986. 16p. 20cm. Prezo: 5,10 gld.

Kibernetiko; Ĉu teorio aŭ praktiko? Budapeŝto: Komputista Grupo de HEA, 1986. 64p. Ilus. 23cm. ISSN 0236

Aŭkcio de historiaĵoj

UEA vendas aŭkcio jenajn duoblaĵojn el sia biblioteko:

1. **Preter la vivo**, Julio Baghy. Budapeŝto 1923, 127 p., broŝ.
2. **Kataluna antologio**, kompilis Grau Casas. Barcelona 1931, 416 p., bind.
3. **Sveda antologio, Unua parto**, redaktis Sam Jansson k.a. Stockholm 1934, 432 p., broŝ.
4. **Ĉeĥoslovaka antologio**, red. O. Ginz kaj St. Kamaryt. Budapeŝto 1935, 468 p., broŝ.
5. **El la "Verda Biblio"**, I. Lejzerowicz. Budapeŝto 1935, 104 p., broŝ.
6. **Sinjoro Tadeo**, Adam Mickiewicz. Varsovio 1955, 334 p., bind.
7. **Enciklopedio de Esperanto**, 2 vol., red. L. Kökény kaj V. Bleier. Budapeŝto 1933-34, 900 p. (triono ilustraĵoj), broŝ.
8. **Plena Gramatiko de Esperanto**, dua tralaborita eldono, K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Budapeŝto 1938, 448 p., broŝ.
9. **Vijf Kunsttalen**, Dr. W.J. Manders. 1947, 386 p., broŝ.
10. **Kvar prelegoj pri Esperanta literaturo**, Drago Kralj. Ljubljana 1960, 190 p., broŝ.
11. **Esperanta bildvortaro**, presprovaĵa eldono, laŭ Duden-vortaro redaktita de R. Eichholz. 672 p., broŝ.
12. **Speciala koverto kun porokaza stampo pri la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto**, Kunming 1985.

Ofertoj devas atingi UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, plej malfrue la 19an de decembro 1986. Sufiĉas mencio de la numero de la aŭkcio.

Efektivaj sendokostoj aldoniĝos (minimуме 5 guldenoj).

8269. ISBN 963 571 153 0. *Internacia Komputado* 1985 n-ro 4. Artikoloj pri komputiko kaj kibernetiko. Prezo: 7,50 gld.

Journée d'étude sur l'Espéranto; Actes. Vincennes à Saint-Denis: Institut de Linguistique Appliquée et Didactique des Langues, 1983. 146p. 20cm. Aktoj de la Universitato de Parizo VIII pri metodologio, psikopedagogio kaj teknikoj en la instruado de lingvoj. Prezo: 12,00 gld.

Konflikto de la Epokoj, La; Libro 2, Edwin de Kock (1930). Pretorio: la aŭtoro, 1985. 20p. 21cm. Dua parto de originala epopeo. Prezo: 3,00 gld.

Krono de l' sonetoj/Sonetni venec, France Prešeren (1800-1849). El la slovena trad. Tone Logar. Klagenfurt: Societo de st. Hermagoro, 1986. 40p. Ilus. 15cm. ISBN 3 85013 046 0. Dulingva eldono slovena-Esperanta, 15 sonetoj de grava slovena poeto. Prezo: 25,20 gld.

Kuraĝigo por la martiroj, Tertuliano. (ĉ.155-ĉ.222). El la latina trad. Gerrit Berveling (1944). Vlaardingen: VoKo, 1986. 12p. 21cm. Voĉoj kristanaj n-ro 12. Unue aperis en *Dia Regno*, 1982. Pri kristanoj en la karceroj en Kartago ĉ. 197 p.K. Prezo: 1,80 gld.

Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, komp. Germain Pirlot (1943). Oostende: la kompilinto, 1986 (6a ĝisdatigita eldono). 22p. 21cm. Prezo: 4,20 gld.

Oranĝa ombrelo. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 150p. Ilus. 18cm. 40 mikronoveloj. Prezo: 4,20 gld.

Pasporta Servo 86/87, komp. B. Wennergren. Roterdamo: TEJO, 1986. 70p. Mapoj. 21cm. Listo de gastigantoj de TEJO, kun pli ol 700 adresoj el 53 landoj. Prezo: 7,50 gld.

Plupo kaj la gruoj, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1986. 24p. Ilus. 16cm. Ĉarma rakonto por infanoj, kun belaj desegnoj pri pejzaĝoj, bestoj kaj plantoj, kaj kun profesia grafika prezento. Prezo: 10,20 gld.

Plupo kaj la lupoj, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1986. 24p. Ilus. 16cm. Alloge ilustrita verketo, kompreniganta al la infanoj la minacon de la moderna socio kontraŭ la naturo. Prezo: 10,20 gld.

Plupo kaj la maro, Inga Borg. El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso Eldonejo, 1986. 24p. Ilus. 16cm. Infanlibreto kun plaĉaj koloraj bildoj, celanta krei komprenemon pri ekologiaj interrilatoj. Prezo: 10,20 gld.

Sude kaj norde de la Granda Muro. Pekino: Ĉina Esperanto-eldonejo, 1986. 90p. Ilus. Mapoj. 26cm. Kolekto da artikoloj kaj koloraj fotoj pri la Granda Muro. Prezo: 15,00 gld.

Sur la vojstreko Ho Chi Minh. El la vjetnama trad. Nguyen Minh Kinh k.a. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1984. 236p. 19cm. Rememoroj pri la fama "vojstreko" dum la vjetnama milito. Prezo: 4,50 gld.

Vortstrukturo en Esperanto, La (1916), René de Saussure (1872-1943). Brasília: Laborgrupo "Antaŭen", 1985. 32p.

22cm. Serio "Brazilaj kajeroj" n-ro 4. Reeldono de grava frua esperantologia verko. Prezo: 3,00 gld.

Was nun Esperanto betrifft..., Richard Schulz (1906). Gerlingen: Bleicher, 1986. 248p. 18cm. ISBN 3 88350 015 1. Eseoj kaj prelegoj de la fama esperantologo kaj verkisto, eldonitaj okaze de la 80a datreveno de lia naskiĝo. Prezo 18,00 gld.

Word Expert Semantics; An interlingual knowledge-based Approach, B.C. Papegaaij, V. Sadler kaj A.P.M. Witkam. Dordrecht/Riverton: Foris Publications, 1986. 254p. 24cm. ISBN 90 6765 261 X. BSO Distributed Language Translation (DLT) n-ro 1. Studoj pri semantiko lige kun maŝina tradukado kaj komputa lingvistiko, kadre de la DLT-projekto. Prezo: 57,00 gld.

Diversaĵoj

Al venko! József Dinnyés. Budapest: Lingvo-Studio, 1986. Kaseto kun 18 kantoj laŭ poemoj de Zamenhof, Baghy, Schwartz k.a. komponitaj de J. Dinnyés. Tekstokajero kun muziknotoj, 24p. Prezo: 18,00 gld.

Ĉu vi gardas sekretojn?, Vilma Sindona Eichholz (1926). Bailieboro: Esperanto Press, 1986. Demando- kaj respondo-ludo per kartetoj por la rektmetoda kurso *En novan mondon*. Prezo: 3,30 gld.

Difin-defio, Vilma Sindona Eichholz (1926). Bailieboro: Esperanto Press, 1986. Demando- kaj respondo-ludo por la rektmetoda kurso *En novan mondon*. Prezo: 5,10 gld.

Insigno "1887-1987-Esperanto". Verda blanka kaj nigra rektangula pingloinsigno kun la jubilea simbolo. 7×4cm. Prezo: 2,10 gld.

Insigno n-ro 19. Kvadrata pingloinsigno kun verda stelo kaj la vorto Esperanto. 1×1cm. Prezo: 2,10 gld.

Omaĝo al Veselin Damjanov, kantas Joëlle Rabu (1958). Vankuvero: Goldrush Records kaj Eduka Fondaĵo Carson, 1986. Stereofona disko, 45 t/m. Du kantoj en plenumo de populara kanada artistino. Prezo: 6,00 gld.

Poŝtkartaro "Internacia Jaro de Paco". Tokio: Libroteko Tokio, 1985. Kvin diversaj kartoj kun poemetoj kaj perbuŝaj pentraĵoj de Hosino Tomihiro. Prezo: 6,00 gld.

Poŝtkartserio "Bela Nederlando". Fotoj de Bert van Loo. Houten: Libroservo F.L.E., 1986. Ok diversaj poŝtkartoj. Prezo de la tuta serio: 3,60 gld. Prezo de unuopa karto: 0,60 gld.

Revido, Div. aŭtoroj, kantas Tanaka Akiko. Tokio: Tokia Esperanto-Kooperativo, 1986. Stereofona 90-minuta kasedo kun tekstoj. Originalaj kantoj en Esperanto kun elektronika muziko. Prezo: 24,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Irano:** S-ino Ĵila Saheb-Zamani sendis informon pri tio, ke la irana revuo *Sporta Mondo* (250.000 ekzempleroj) jam dum 20 numeroj aperigis sportan vortaron en la persa, la araba, la angla kaj Esperanto. En lastatempa numero ankaŭ aperis raportoj pri la Pekina UK kaj aliaj Esperanto-aferoj. Respondekas pri la Esperanta flanko de la revuo s-ro Ĥejr-Ĥah el Tehrano.

● **Brazilo:** La 15an de aprilo, la brazila deputito Denisar Arneiro faris paroladon antaŭ la Ĉambro de Deputitoj en la brazila parlamento omaĝe al la 69a datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof. Li menciis plurajn aktualajn eventojn kaj statistikojn en la Esperanto-movado, surbaze de informoj kiujn transdonis al li *Esperantopres*, brazila informoservo.

Aŭskultinte lian paroladon, ankaŭ deputito Freitas Nobre faris, du tagojn poste, paroladon favore al Esperanto kaj ĝia Centjariĝo.

● **Pakistano:** UEA antaŭnelonge ricevis stokon da broŝuroj, "Nia Lando Pakistano", verko de s-ro Saeed Ahmed Farani honore al la Jubilea Jaro. La libreto informas i.a. pri la starigo de "Esperanto-Akademio" en Jhelumo, kadre de kio oni esperas eldoni kvin librojn antaŭ la fino de 1987. Ekzempleroj de la verko, kiu cetere priskribis diversajn aspektojn de pakistana kulturo kaj vivkutimoj, haveblas de la Libroservo kontraŭ 3,00 guldenoj.

● **Svedio:** Komence de junio en Uppsala okazis kongreso de la sveda asocio de UN-kluboj. El 44 proponoj, kiujn la kongreso traktis, du temis pri diversmaniera subteno al Esperanto. La kongreso unuanime akceptis la propo-

nojn, kiuj rekomendis al la UN-kluboj studi la eblojn pli amplekse uzi Esperanton.

● **Tradukreto:** La Internacia Tradukreto (vd. *Esperanto* 1986, p.91) rapide disvastiĝas. Jam fondiĝis kvar naciaj asocioj en Ĉinio, Hispanio, Portugalio kaj Francio. Inter aliaj celoj, oni intencas starigi kursojn pri tradukado, utiligante tekstojn pri diversaj teknikaj temoj; progresigi laboron pri teknikaj vortaroj per enspezoj de komerca tradukado; pretigi ĝisdatajn teknikajn informojn por nacilingvaj revuoj kaj gazetoj; kaj varbi novajn kunlaborantojn. Kontakto: Claude Bodson, CMIA, Montigny en Cis, F-59225 Clary, Francio.

● **Biologia Nomenklature:** Seminario pri Nova Biologia Nomenklature okazis la 22-23ajn de aŭgusto en Kulturo Centro Esperantista, la Chaux-de-Fonds (Svislando). Oni nun akceptis 104 NBN-nomojn, dum 13 listoj da pliaj nomoj atendas taksadon de NBN-komisionoj. Teksto pri enkonduko kaj akceptigo de novaj nomoj haveblas de la Asocio por Enkonduko de Nova Biologia Nomenklature, Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout, Belgio.

● **Sociologio:** Alicia Sakaguchi kaj Probal Daŝgupto prelegis pri planitaj lingvoj kaj Esperanto dum la 9a Mondkongreso de Sociologio en New Delhi, Hinda Unio, 18-24 aŭgusto. Anglalingo raportis pri la kongreso, kiu enhavos la tekstojn de la koncernaj prelegoj, eldoniĝos libroforme ĉe la Eldonejo Gruyter (Berlino/Novjorko).

● **Blinduloj:** En Hago, Nederlando, ekzistas blindulbiblioteko kie oni ankaŭ sonbendigas librojn en Esperanto. En la daŭro de multaj

Nekrologoj

JEAN HERBECK (1900-1986), konata sindikata sekretario kaj delonge aktiva esperantisto, mortis la 19an de marto en Worms, FR Germanio.

JAROSLAV KLEMENT (1935-1986) mortis la 10an de junio en Karlovy Vary, Ĉeĥoslovakio, kie li estis loka delegito kaj fakdelegito pri heraldiko.

AHTO LINJA (1912-1986), honora membro de Esperanto-Asocio de Finnlando, mortis la 15an de junio en Helsinko. Renoma numismatikisto, li iniciatis la eldonon de medalo pri d-ro Vilho Setälä.

N.G. NILSSON, dumviva membro de UEA, forpasis ĉi-jare en Göteborg, Svedio.

RUTH PAINTNER-TRUMPP (1899-1986) forpasis en Munkeno, FR Germanio, la 13an de junio ĉi-jare. Ŝi estis dum multaj jaroj unu el la plej malavaraj mecenatoj de UEA, kun specifa deziro subteni la terminologian laboron en Esperanto. Al la koncerna fon-

daĵo s-ino Paintner-Trumpp kontribuis dekojn da miloj da guldenoj, kaj, konforme al unu el ŝiaj lastaj deziroj, tiu aparta agadkonto en UEA nun portas la nomon "Fondaĵo Wüster".

DORIS M. SINCLAIR (1915-1986) mortis la 28an de junio en Nambour, Aŭstralio. Ŝi estis dumviva membro de UEA, kaj ankaŭ loka delegito kaj fakdelegito. En 1970 ŝi fariĝis la unua prezidanto de Esperanto-Asocio de Kvinslando.

J. SOETEMAN (1902-1986), UEA vicdelegito en Nederlando, forpasis ĉi-jare en Twello.

MAXIMILIEN TRENNER (1902-1986), delonge esperantisto kaj fakdelegito pri ateismo, mortis la 15an de junio en Paris, Francio.

MÁXIMO VALENTINUZZI (1907-1986) mortis ĉi-jare en Buenos Aires, Argentino. Li estis fadelegito pri biomatematiko, kaj ankaŭ vicdelegito en Argentino dum multaj jaroj.

jaroj, jam multaj libroj, originale verkitaj kaj tradukitaj, aperis sur sonbendoj. Laste aperis "Por miaj gesamideanoj", verkita kaj voĉlegita de haga esperantistino Truus van Woerden.

● **Korespondemuloj:** Venis novaĵo, ke Koresponda Servo Mondskala lastatempe ricevis sian 500an novan aliĝinton en 1986: 10 elcenta kresko kompare kun la antaŭa jaro.

Personoj

● **Muller:** Robert Muller, kiu lastatempe ricevis la Premion Zamenhof por Internacia Kompreniĝo aljuĝitan de UEA, fariĝos Kanceliero de la Universitato de Paco en Kostariko. S-ro Muller antaŭe estis la Vica Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. La Universitato laboras per instruado, esplorado kaj disvastigado de informoj, celante "stimuli kunlaboron inter la popoloj kaj helpi redukti obstaklojn kaj minacojn al tutmonda paco kaj progreso".

● **Keller:** Sekve de poresperantaj laborrestadoj en Srilanko, Stefano Keller denove aktivas en la insulo. La svisa porinfana helporganizo Terre des Hommes petis lian kunlaboron al realigo de nova projekto: malfermo de infanhejmo por orfoj de la interetna milito.

● **Kořínek:** La internacie konata originala poeto kaj diligenta tradukanto el la ĉeĥa kaj slovaka literaturoj, Jiří Kořínek, ĝisvivis la unan de oktobro sian 80an vivojaron. Kvankam la plejparto de lia verkaro restas ankoraŭ en manuskripto, dudeko da liaj originalaĵoj kaj tradukaĵoj rikoltis premiojn en Esperantaj belartaj konkursoj. Multjara membro de UEA, li laboris jam pli ol 60 jarojn por progresigi Esperanton kaj en kaj eksterlande.

KOTIZTABELO POR 1987

Lando/valuto	MG	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/guldeno	6,50	16	40	24	12	80
Aŭstralio/dolaro	8	20	50	30	15	100
Aŭstrio/ŝilingo	67	168	420	252	126	840
Belgio/franko	200	500	1250	750	375	2500
Brazilo/guldeno	6,50	16	40	24	12	80
Britio/pundo	3,20	8	20	12	6	40
Bulgario/guldeno	7,50	18,80	47	28,20	14,10	94
Ĉeĥoslovakio/krono	40	100	250	150	75	500
Danlando/krono	38	96	240	144	72	480
Finnlando/marko	24	60	150	90	45	300
Francio/franko	32	80	200	120	60	400
FR Germanio/marko	10,50	26	65	39	19,50	130
Germana DR/guldeno	10	24	60	36	18	120
Greklando/draĥmo	480	1200	3000	1800	900	6000
Hinda Unio/rupio	32	80	200	120	60	400
Hispanio/peseto	480	1200	3000	1800	900	6000
Hungario/forinto	128	320	800	480	240	1600
Irlando/pundo	2,90	7,20	18	10,80	5,40	36
Islando/krono	160	400	1000	600	300	2000
Israelo/guldeno	9	22,80	57	34,20	17,10	114
Italio/nova liro	6,50	16	40	24	12	80
Japanio/eno	880	2200	5500	3300	1650	11000
Jugoslavio/dinaro	1200	3000	7500	4500	2250	15000
Kanado/dolaro	6,50	16	40	24	12	80
Korea Resp./guldeno	9	22,80	57	34,20	17,10	114
Nederlando/guldeno	12	28	70	44,50*	22,30*	140
Norvegio/krono	35,20	88	220	132	66	440
Nov-Zelando/dolaro	9,60	24	60	36	18	120
Pollando/guldeno	6,50	16	40	24	12	80
Portugalio/eskudo	480	1200	3000	1800	900	6000
Soveta Unio/guldeno	8,50	21,20	53	31,80	15,90	106
Sud-Afriko/guldeno	12	28	70	42	21	140
Svedio/krono	35,20	88	220	132	66	440
Svislando/franko	10	24	60	36	18	120
Usono/dolaro	5,60	14	35	21	10,50	70
TARIFO A/guldeno	7	18	45	27	13,50	90
TARIFO B/guldeno	6,50	16	40	24	12	80

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Bermudo, Honkongo, Kuvajto, Malto, Saŭda Arabio, Singapuro, Venezuelo.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.

* inkluzivas la enlandan imposton de 6%.

- MG:** Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado
- MJ(-K):** Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 25 jaroj, revuo *Kontakto* sen plia abonpago)
- MA(-K):** Individua Membro-Abonanto kiel MJ(-K) plus la revuo *Esperanto*
- SA:** Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
- Kto:** Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO
- SZ:** Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (ne inkluzivas membrecon en UEA)
- PT:** Patrono de TEJO: pagas duoble la abonon al *Kontakto* (sed ricevas nur unu abonon), por subteni TEJO
- DM:** Dumviva membro de UEA pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj se kaj dum oni ankoraŭ estas malpli ol 26-jara, la revuon *Kontakto*.

Atenton Usonanoj: se vi estas serioza aktivulo pri paco, mi invitas vin iĝi membro de la usona sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Kotizo estas \$8 jare, kaj vi ricevos la revuon *Paco*, la oficialan organon de MEM. Informo havebla ĉe: Jim Deer, 11905 SW Settler Way, Beaverton, OR 97005, Usono.

Pri sciencfikciaj temoj kaj ties tradukado deziras korespondi kuba verkisto-tradukisto serĉanta eblecon krei tutmondan reton, kiu ebligas nacilingva-Esperanta-nacilingvan fluadon. Skribu al Arnoldo Aguila, A-451 (1er Piso) e 19 y 21, Vedado, C. de la Habana, Kubo.

Bonvenigu fondon de lerneja klubo; "Unu Mondo", Reading School, Anglio RG1 5LW. Ni salutos ĉiujn.

Ekslibrisojn interŝanĝas aŭ aĉetas s-ro Bruggeman, Dikkebeuklaan 22/133, B-1090 Bruselo, Belgio.

Juna kamparano, 25-jara, deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj: Aijeltt, Cenowa Batai, Wugang Qu, Pingdingshan, Henan, Ĉinio.

Junulara grupo en Berlino aranĝos lertesperon kaj ekspozicion en aprilo 1987, okaze de 750-jara urba jubileo kaj la Jubilea Jaro. Salutleterojn aŭ Esperantaĵojn petas, kun garantio de respondo, Ingo Fisher, Ho-Chi-Minh-Str. 19/B, 2 Etage/0204, Berlin, DDR-1156

Alex Humet komunikas al siaj geamikoj kaj al tiuj, kiuj konis ŝin, la morton de sia patrino Lourdes Cienfuegos, okazintan la 24an de julio ĉisomere en Barcelono.

René Bastong, ĉefa respondeculo de Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) estis grave vundita en Parizo, meze de septembro, de bombo lanĉita de teroristo. Li bedaŭrinde mortis, post longa senkonscio, la 6an de novembro.

Zairiano 26-jara deziras korespondi kaj interŝanĝi kasedojn kun

kantist(in)oj, aparte en Skandinavio, Nord-Ameriko, FRG, Hispanio kaj Pollando. Mem verkas kantojn en Esperanto kaj registras tiujn kasede. Skribu al Mayoma-Diankembo, B.P. 152, Kinshasa 7, Zairio.

Filatelistoj! Iranajn filatelaĵojn kontraŭ internaciaj respondkuponoj sendos M. Karamudini, P.O. Box 13445, 747 Tehran, Irano.

Pri tradukarto, Esperanta literaturo kaj kolektado de poŝtmarkoj kaj moneroj deziras korespondi tutmonde Tong Xiaolun, Senlinjingyingju Zhong Chang, Dunhuasi, Jinlin, Ĉinio.

Pri filatelo deziras korespondi tutmonde s-ro Yaba-Luntadila, B.P. 1972, Kinshasa 1, Zairio.

Deziras korespondi kun samideanoj tutmonde Jalal Afshari, Yazdani repair shop, Bazar ruz, Miankuh, Aghajari, Khuzistan, Irano.

Pri diversaj temoj, inkluzive literaturon, filozofion, fotografarton, turismon, volas korespondi 22-jara Stanislaw Debski, str. Glowna 55, 97-122 Rozyca Pollando.

Deziras korespondi pri la temoj de sporto, politiko, arto, amo k.a. s-ro Saiid Pakravan, P.O. Box 4596, 91375 Meshed, Irano.

Grupo da iranaj gefraŭloj organizis klubon de junaj esperantistoj kaj deziras korespondi kaj kunlabori kun aliaj esperantistoj tutmonde. Skribu al: P.O. Box 3563, 91375 Meshed, Irano.

Sonbendigita teksto de la hispanlingva lernolibro *Sabe Ud. Esperanto?* de J. Hess mendeblas ĉe la libroservo de Argentina Esperanto-Ligo, Belgrano 211, 1888 Florence Varela (BA), Argentino. Prezo: US\$10, kun libro US\$13.

Deziras korespondi kun gejunuloj tutmonde pri historio, sporto, literaturo, 26-jara fraŭlo Yu Rongkang, Shashi No. 1 Textile Equipment Plant, Shashi Hubei, Ĉinio.

Oficiala Informilo

JARLIBRO 1986

Pro manko de laborfortoj en la Centra Oficejo dum tri kvaronoj de 1986, *Jarlibro* 1986 iris al la presejo nur meze de novembro kaj aperos en la unuaj tagoj de decembro. Tio signifas, ke ĝi atingos la membraron en la lastaj tagoj de la jaro. Tamen, ĝi estas tute aktuala kaj ĝisdata, tiel ke *Jarlibro* 1987 povos aperi en la unuaj monatoj de 1987.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Japanio: K. Deguti. Usono: M. Lewin.

DONACOJ 1986 (gld.) ĝis la 1-a de novembro

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo F.C. Midas 18 750,00. Sumo ĉi-jara 18 750,00

JUBILEA JARO: Nederlando: E.M. Maasbommel 100,00. Sumo ĉi-jara 2366,97.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Japanujo: T. Kuwahara 183,33. Kanado: B. Salt 169,23. Nederlando: 3-landa rekontiĝo Maastricht 35,00; A. Childs-Mee 69,15; H. Bakker 1500,00. Svedio: Sveda Esperanto-Federacio (aŭkcio) 121,86. Sumo ĉi-jara 3705,64.


FONDAĴO CANUTO: Nederlando: H. Bakker 1000,00. Svedio: E. Brenander 69,49; E. Swärd 67,36. Sumo ĉi-jara 1592,21.

ĜENERALA KASO: F.R. Germanio: V. Muhsal 29,25. Nederlando: N.L. Daams 11,77; B.M. Slösser-Bresler 100,00; Merkurio 300,00. Svedio: S. Sundin 2611,74; H. Sundström 33,22. Usono: A. Casey 285, 78. Anonime 60,00. Diversaj malgrandaj 25,33. Sumo ĉi-jara 5948,70.

FONDAĴO WUSTER: Anonima donaco 2252,65.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA



Diskriminacio

prelegoj kaj komentarioj

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturan diskriminacion. *Diskriminacio* diskutigas ankaŭ pri aliaj diskriminacioj kaj donas proponojn por agado i.a. en klubvesperoj.

Diskriminacio traktas ★ la radikojn de diskriminacio ★ diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj ★ internacian ekonomian diskriminacion ★ diskriminacion kontraŭ virinoj ★ diskriminacion pro seksa orientiĝo ★ diskriminacion pro religio ★ maldiskriminacion kaj ★ lingvan diskriminacion.

Diskriminacio; Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto, red. Renato Corsetti. Rotterdam: UEA, 1984. 175p. 21cm. ISBN 92 9017 031 X. Prezo: 21,00 gld.

Abonu



Nun komenciĝas la abonvarba kampanjo de *El Popola Ĉinio* por 1987. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1 okt. 1986 ĝis 28 feb. 1987), ricevos unu artefaritan rubildon. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando, rekte al Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio, aŭ al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Bv. noti**, ke UEA peras nur laŭ la nederlanda tarifo.

ABONTARIFO DE EL POPOLA ĈINIO en lokaj valutoj (ekvalida de 1 okt. 1986):

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	14,00	24,00	34,00
Aŭstrio	AUS	200,00	340,00	480,00
Belgio	BEF	550,00	930,00	1300,00
Britio	GBP	8,00	13,60	19,00
Finnlando	SFK	64,00	108,00	150,00
Francio	FRF	90,00	150,00	210,00
FR Germanio	DEM	30,00	50,00	70,00
Hispanio	ESP	1200,00	2000,00	2900,00
Italio	ITL	18000	30600	43000
Japanio	JPY	3000,00	5400,00	7500,00
Jugoslavio	YUD	500,00	900,00	1300,00
Kanado	CAD	13,00	22,00	30,00
Nederlando*	NLG	34,00	58,00	82,00
Nov-Zelando	NZD	20,00	34,00	48,00
Portugalio	PTE	1100,00	1800,00	2600,00
Svislando	CHF	25,00	42,00	60,00
Usono	USD	12,00	20,00	28,00

* Nederlandaj klientoj bv. aldoni 5% por la enlanda imposto.

Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8,00	13,60	19,00
USD	10,00	17,00	24,00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

GBP	5,00	8,50	12,00
USD	6,50	11,00	16,00

La varbilon kaj senpagan specimenon Guoji Shudian sendas laŭ peto.

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: *INTERNACIA BIBLIO-MISIO*, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

internacia magazino sendependa

MONATO

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
speranto-revuo.

Inform-riĉa, bele ilustrita.


Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.



Koresponda
Servo
Mondskala
de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121bis, BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.



KULTURA ESPERANTO DOMO Grésillon F-49150 BAUGÉ

La "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" estas kooperativa societo fondita en 1951. Ĝi posedas la bienon "Grésillon" kun kastelo kaj 17-hektara parko. Ĉiujare ĝi organizas:

kursojn diversgradajn,
prelegojn diverstemajn,
distraĵojn diversspeciajn,
ekskursojn en belega regiono.

KULTURAJ ARANĜOJ 1987

- 19/4 - 25/4: Internacia Renkonto de Infanoj
- 14/6 - 30/6: Internacia renkonto
- 2/6 - 16/6: Prelegoj kaj Kurso
- 16/22: Altnivela Semajno
- 23/8 - 7/8: Someraj Kursoj
- 13/8 - 8/8: Someraj Kursoj
- 13/30: Lernado, praktiko, turismo.

Detala programo aperos en novembro. Jam rezervu datojn. Skribu al: Esperanto-Domo, Grésillon
49150 - Baugé - Francio

Inter pli ol 2 700 titoloj ĉe la Libroservo de UEA, ne troveblas pli valora libro kontraŭ pli bagatela prezo!

Doña Bárbara


fama romano de famaj aŭtoro kaj tradukinto

"La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo tre malmulte da ekzemploj." (Waringhien)

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia traduka prozo..." (Régulo Pérez)

"La traduko impresas mirinde klara kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en 'La faraono'." (Vatré)

Doña Bárbara (1929), Rómulo Gallegos (1884-1969). El la hispana trad. P. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: 16,20 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj!



BRUSELA ESPERANTO-CENTRO

- Avangarda Esperanto-agado en laabela Eŭropa ĉefurbo
- Sidejo de Monda Turismo — Eŭropa Esperanto-Centro — Belga Esperanto-Federacio — Brusela Esperanto-Grupo
- Ĉiam internaciaj etoso kaj renkontoj
- Situita en kvietaj kvartaloj tuj ĉe la malnova urbo-metrostacio Luizo (Schotlandstr. 73, 1060 Bruselo)
- Celo de pluraj Esperanto-buslinioj el Orienta Eŭropo
- Loĝebleco laŭ Pasporta Servo aŭ en apartamentetoj kaj perado de hoteloj de 700 ĝis 7000 bfr. (nur tranokto)
- Bona elfluĝejo por via eŭropa vojaĝo

Tel. + 32 2 53 87 166. Konto: 961. 0907434. 91 Bruselo

Gravaj verkoj por malalta prezo

La libroservo de UEA fariĝis la sola distribuanto de la ĉi-subaj libroj kaj povis malaltigi ilian prezon, donante trionan rabaton por samtempa aĉeto de minimume 3 ekz. de sama titolo:

Fundamento de Esperanto, L.L. Zamenhof, 355p., broŝ. Prezo: 9,90 gld.

Hamleto, W. Shakespeare (trad. Zamenhof), 206p., bind. Prezo: 7,80 gld.

Marta, E. Orzeszko (trad. Zamenhof), 213p., bind. Prezo: 8,70 gld.

Sen eliro; La respektima p..., J.-P. Sartre (trad. R. Bernard), 111p. Prezo: 4,80 gld.

Falsaj Amikoj en Esperanto, R. Bernard & A. Ribot, 39p. Prezo: 2,10 gld.

Dictionnaire Français-espéranto, Léger & Albault, 672., bind. Prezo: 13,50 gld.

SPECIALA OFERTO: Mendante samtempe la tri zamenhofajn librojn (Fundamento, Hamleto, Marta) antaŭ la 31a de decembro 1986 vi devas pagi nur 22,00 gld. (+ sendokostojn)! Profitu la okazon jam antaŭ la Tago de la Esperanta Libro!

Monda Turismo, la plej sperta turisma organizo pri rilatoj inter orientkaj okcident-eŭropo proponas al vi "denove" plej interesan kaj avantaĝan vojaĝon por ĉiuj! Ĉu en kampadejo, ĉu en hotelo je la plej favoraj kondiĉoj!

Jubilea Karavano

Varsovio 72a UK 25 julio- 1 aŭgusto

Londono (15 julio) - Bruselo (15/16) - Roterdamo - Hanovro - Berlino (16/17) - Poznano - Bidgoŝto (18-25) - VARSOVIO (25 jul.-1 aŭg.) - Ĉestokovo - Opole - Vroclavo - Gorzeleco (2/3) - Bad Herzfeldo (3/4) - Koblenzo - Luksemburgo - Bruselo (4-5) - Londono (5 aŭgusto)

ANTAŬPAGO: 250 DM - 5250 Bfr. - fl. 290 - 80L

La tuta pago konsistos el: Karavankotizo + plenpensio dum la Bydgoŝtaj Tagoj + duonpensio dum la 72 UK en Varsovio + vojaĝo kaj ekskursoj dum la tuta programo

ANTAŬKONGRESO

18 — 24 JULIO

Konferenco de Monda Turismo

3-a Turisma Simpozio

12-aj Esperanto-Tagoj de Bidgoŝto

Pluajn informojn ĉe Monda Turismo, Skotlandstr. 73, B-1060 Bruselo

Prioritato al antaŭpagintoj laŭ la alveno de la pagoj!